

El Popola Ĉinio


人民中國報道



PEKINO 4 1 9 6 0

ELDONAS: ĈINA ESPERANTO - LIGO

VERDA TOTO
SPERANTO
SOCIAK-DIREKCIJNA 214



La giganta riverbaro de Hin-an-rivera Hidroelektra Stacio tuj finkonstruota

Foto de Ĝang Mingsen

Prezidanto Maŭ Zedong Parolis kun Gastoj el Azio, Afriko kaj Latinameriko

En la unuaj tagoj de majo, Prezidanto Maŭ Zedong akceptis kelkfoje gastojn el Azio, Afriko kaj Latinameriko. Jene estas raporto pri la paroloj kiujn li havis kun ili, publikigita en la gazeto "Ruĝa Standardo", n-ro 10, 1960.

— Red.

En la unua tagdeko de majo, kamarado Maŭ Zedong, tiam en Ginan kaj Ĝengĝou, akceptis membrojn de delegacioj kaj aliajn amikojn el La-

tinameriko, Afriko, Irako, Irano kaj Cipruso, vizitantajn Ĉinion. Kamarado Maŭ Zedong faris kelkfojajn parolojn okaze de ĉi tiuj akceptoj.

Je la 3-a de majo, en Ginan, kamarado Maŭ Zedong akceptis sindikatajn kaj virinajn delegaciojn kaj delegitojn el 14 landoj kaj regionoj en Latinameriko kaj Afriko, vizitantajn Ĉinion.

Kamarado Maŭ Zedong havis intiman paroladon kun ĉi tiuj amikoj, esprimis al ili la firman subtenon de la 650 milionoj da ĉinaj popolanoj al la naciaj kaj demokratiaj movadoj entreprenataj de la popoloj de Kubo kaj la tuta Azio, Afriko kaj Latinameriko. Li dankis ilin pro ilia subteno kaj helpo al nova Ĉinio kaj elmontris: Nia komuna malamiko estas usona imperiismo, ni ĉiuj staras sur la sama fronto kaj devas unuigi kaj subteni unu la alian. La popolo de la tuta mondo, inkluzive la popolon de Usono, kamarado Maŭ Zedong diris, estas niaj amikoj. Li ankaŭ esprimis subtenon al la okazonta konferenco de la ĉefoj de la kvar potencoj. La amikoj el tiuj ĉi landoj, siaparte, priparolis la nunajn batalojn kontraŭ imperiismo por gajni kaj konservi nacian sendependecon kaj demokration en iliaj respektivaj landoj; ili esprimis siajn decidemon kaj memfidon pri venko super ĉiaj malfaciloj kaj gajno de fina venko.

Je la 7-a de majo, en Ĝengĝou, kamarado Maŭ Zedong akceptis publikajn aktivulojn, laborantojn por paco kaj delegitarojn kaj delegitojn de sindikatoj, junuloj kaj studentoj el 12 afrikaj landoj kaj regionoj vizitantajn Ĉinion.

En la akceptado, gastoj kaj delegitoj parolis kun profunda sento pri la mizero kaj sufero kiujn ili suferis dum multaj longaj jaroj sub imperiisma subpremado kaj ekspluatado, kaj priparolis la batalojn kiujn ili faris kontraŭ imperiismo kaj koloniismo. Ili esprimis siajn decidemon kaj memfidon pri gajno de plena venko. Ili parolis pri siaj profunda amikeco al la ĉina popolo kaj respekto kaj amo al kamarado Maŭ Zedong.

Kamarado Maŭ Zedong, en la nomo de la 650 milionoj da ĉinaj popolanoj, esprimis plenan sim-

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Gazeto

Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo

Adreso: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Enhavo de N-ro 4 (61) 1960

Bildo sur la kovrilo — **En Kamparo** (Ligno-gravuraĵo de Ĝaŭ Janĝan)

Prezidanto Maŭ Zedong parolis kun gastoj el Azio, Afriko kaj Latinameriko

P. L. A. bombardas Ginmen en armita kontraŭusona manifestacio

Forpeli usonan imperiismon el Azio!

Adiaŭ, "Dio de Pesto" Eisenhower

Ŝtormo en Azio

Hurlo de ŝanhajaj laboristoj

Nova alttajo de akvoutiliga konstruado

Kresko de ŝparaĵoj — plibonigo de la vivo


Hazardludejo transformiĝis en kulturen centron

La kultura disvolviĝo de ĉinaj nacimallimultoj

Kvin Orfloroj

Problemoj de traduka laboro esperanten

Bildo sur la dorsa kovrilo — **Jungado de la Flava Rivero** (Ligno-gravuraĵo de Ŝaŭ Keping)



**Prezidanto Maŭ inter
popolanoj de Azio, Af-
riko kaj Latinameriko**

*Pentris Vu Biduan,
Gin Ŝangji*

pation kaj subtenon al la heroa batalo de la afrika popolo kontraŭ imperiismo kaj koloniismo. Li ankaŭ esprimis simpatian kaj subtenon al la patriotaj kaj justaj bataloj nun farataj de la sudkorea popolo kaj la turka popolo kontraŭ usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. Li opiniis, ke la bataloj de la sudkorea popolo kaj la turka popolo indikas, ke la ŝtormo de la bataloj fare de la subpremataj popoloj de la diversaj landoj en Azio kontraŭ imperiismo kaj ĝiaj lakeoj havos eĉ pli grandan levigon. Tiuj ĉi bataloj formas subtenon al la justaj bataloj de la afrika popolo, la latinamerika popolo kaj la popolo de la tuta mondo. La justaj bataloj de la popoloj de diversaj landoj en la mondo subtenas unu la alian, kamarado Maŭ Zedong diris. Li dankis la afrikajn amikojn pro ilia profunda amikeco al la ĉina popolo, aklamis la grandan solidarecon de la ĉina kaj afrikaj popoloj kaj esprimis firman fidon, ke fina venko certe estos gajnita en la komuna batalo kontraŭ imperiismo kaj koloniismo.

Je la 8-a de majo, en Ĝengĝou, kamarado Maŭ Zedong akceptis amikojn el ok latinamerikaj landoj vizitantajn Ĉinion.

En la akceptado, li unue esprimis varman bonvenigon al la amikoj el Latinameriko, kaj parolis al ili pri spertoj de la ĉina popolo en revolucia batalo kaj socialisma konstruado. La latinamerikaj gastoj

diris al li siajn impresojn pri Ĉinio akiritajn dum sia vizitado. Ili varme laŭdis la atingojn de la ĉina popolo en sia laboro, la Ĝenerala Linio de Ĉinio por socialisma konstruado, la antaŭensaltego kaj la popola komunumo, same kiel la kontribuoj faritaj de la ĉina popolo al mondopaco kaj la afero de progreso de la homaro. Ili ankaŭ tuŝis la historiajn interligojn kaj la ĉiam kreskantan amikecon inter la popoloj de Latinameriko kaj Ĉinio. La latinamerika popolo kaj la ĉina popolo, ili diris, havas komunan malamikon, t.e. usona imperiismo. Ili parolis pri la bataloj faritaj de la popoloj de Kubo kaj aliaj latinamerikaj landoj kontraŭ usona imperiismo. Ili esprimis la opinion, ke la latinamerika popolo, unuiganta inter si mem kaj kun la ĉina popolo kaj la popoloj de la ceteraj mondpartoj, certe gajnos la finan venkon en la batalo kontraŭ imperiismo.

Kamarado Maŭ Zedong dankis ilin pro ilia amikeco al la ĉina popolo. La ĉina popolo, li diris, ĝuste kiel la latinamerika popolo, longe suferis de imperiisma subpremado kaj ekspluatado. Sin apogante sur propra unuigo kaj subteno de la popoloj de diversaj landoj, la ĉina popolo faris malfacilan kaj longdaŭran bataladon kaj finfine renversis la regadon de imperiismo, feŭdismo kaj burkrata-kapitalismo en Ĉinio. Nun ĝi konstruas sian propran landon kaj ŝanĝas ĝian aspekton de "malriĉeco kaj kultura blankeco". La ĉina popolo plene kredas ke

ĝi povas bone konstrui sian landon kaj tial ĝi bezonas tempon, pacon kaj amikojn. La kuba popolo, la popolo de Latinameriko kaj la popolo de la tuta mondo, li diris, ĉiuj estas amikoj de la ĉina popolo; la imperiismo kaj ĝiaj lakeoj estas niaj komunaj malamikoj, sed ili estas eta malmulto. La gajno de mondpaco, li diris, ĉefe dependas de la bataloj de la popoloj de la diversaj landoj. Kamarado Maŭ Zedong esprimis admiron al la heroa batalo de la kuba popolo kontraŭ usona imperiismo. La bataloj de la popolo de Kubo kaj aliaj latinamerikaj landoj helpis la ĉinan popolon, li diris, kaj la batalo de la ĉina popolo ankaŭ helpis la popolon de Kubo kaj aliaj latinamerikaj landoj. La popolo estas la decida faktoro. Apogante nin sur la unuiĝo kaj batalo de la popolo ni nepre venkos la imperiismon kaj ĝiajn lakeojn kaj atingos longdaŭran mondpacon.

Je la 9-a de majo, kamarado Maŭ Zedong akceptis, denove en Ĝengĝou, amikojn de la Iraka Kultura Delegacio, la Iraka Laborista Delegacio, la Sindikata Delegacio de Irano kaj la Delegacio de la Ciprusa Federacio de Laboristoj, vizitantajn Ĉinion.

Kamarado Maŭ Zedong kaj la amikoj el Irako, Irano kaj Cipruso parolis pri la situacio kaj sperto de la bataloj faritaj de la popoloj de diversaj landoj kontraŭ imperiismo kaj ĝiaj lakeoj.

Kamarado Maŭ Zedong diris: La plej granda imperiismo en la mondo hodiaŭ estas usona imperiismo. En multaj landoj troviĝas ĝiaj lakeoj. La subtenatoj de imperiismo estas ĝuste tiuj forjetitaj de la vastaj popolamasoj. Ĉiang Kajsek, Ri Sungman, Kiŝi, Batista, Said, Menderes kaj similaj aŭ jam estas renversitaj aŭ estos renversitaj de la popolo. La levigo de la popolo en ĉi tiuj landoj kontraŭ la lakeoj de usona imperiismo kaj alia imperiismo estas ankaŭ batalo kontraŭ la reaktia regado de imperiismo. La japana popolo estas leviganta por agado, kamarado Maŭ Zedong diris. La vastaj amasoj de la japana popolo estas nun farantaj manifestacion en pli granda skalo ol iam ajn antaŭe por batali kontraŭ la agresa militalianca traktato subskribita inter Kiŝi-registaro kaj usona imperiismo. La ĉina popolo decideme subtenas tiun ĉi batalon de la japana popolo. La justaj bataloj de la popoloj de diversaj landoj en la mondo, li diris, ricevis kaj daŭre ricevos firman subtenon de la 650 milionoj da ĉinaj popolanoj. La tagoj por imperiismo ne estos multaj, li diris. La imperiistoj faris ĉiuspecajn malbonojn kaj ĉiuj subpremataj popoloj de la tuta mondo neniam ilin pardonos. Por venki la reakcian regadon de imperiismo, kamarado Maŭ Zedong diris, estas necese formi vastan unuigitan fronton kaj unuigi ĉiujn

unuigeblajn fortojn ekskluzive de la malamiko, kaj daŭre fari penigajn batalojn.

La amikoj el Irako, Irano kaj Cipruso dankis kamaradon Maŭ Zedong pro liaj akceptado kaj parolo. Ili diris ke ili batalos kontraŭ imperiismo kune kun la ĉina popolo kaj la popolo de la tuta mondo. Fine, kamarado Maŭ Zedong proponis tostadon por la plua unuiĝo de la popolo de la mondo, por la venko de la batalo de la japana popolo kaj por la venko de la tutmonda popolo en sia batalo kontraŭ imperiismo kaj ĝiaj lakeoj.

* * *

Jene estas raporto de Hinhua-Novajagentejo el Vuhan datita je la 14-a de majo, 1960. — Red.

Prezidanto Maŭ Zedong akceptis japanajn, kubajn, brazilajn kaj argentinajn gastojn en Vuhan je la 14-a de majo. Ili estis la Delegacio de la Japania-Ĉinia Amikeca Asocio; la Delegacio de la Ĝenerala Konsilantaro de Sindikatoj de Japanio; la Japana Medicina Delegacio; Minoru Takano, eminentulo en la japana laborista movado; kelkaj japanaj ĵurnalistoj; la Studenta Delegacio de Kubo; la Delegacio de Radio-disaŭdigaj kaj Televidaj Laborantoj de Brazilo; kaj la Argentina Kultura Delegacio.

Prezidanto Maŭ Zedong unue esprimis sian bonvenigon al la japanaj, kubaj, brazilaj kaj argentinaj amikoj je ilia vizito al Ĉinio. Li esprimis sian prizorgon pri la lukto de la japana popolo kontraŭ la japania-usona traktato de milita alianco. La nova japania-usona "Sekura Traktato", li diris, estas destinita por subpremi la amasojn de la japana popolo kaj ĝi estas agresa militalianca traktato malamika al Ĉinio kaj Sovetunio kaj al la aziaj popoloj. Ĝi estas serioza minaco al la paco de Azio kaj de la mondo, kaj samtempe ĝi neeviteble alportos katastrofon al la japana popolo. La popoloj de Ĉinio kaj Japanio, la aziaj popoloj kaj la pacamaj popoloj tra la tuta mondo, ĉiuj devas kontraŭbatali tiun ĉi traktaton.

Usona imperiismo estas la komuna malamiko de la ĉina kaj japana popoloj, la komuna malamiko de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko, kaj la komuna malamiko de la pacamaj popoloj de la tuta mondo, Prezidanto Maŭ diris. Imperiismo bredis siajn lakeojn en multaj landoj. Ili estas malŝatataj de la popolo de siaj propraj landoj. La Kiŝi-registaro en Japanio estas tia registaro, li deklaris. Ankaŭ klarvidaj patriotaj membroj de la Japana Libera Demokrata Partio montris malkontenton al la reaktiaj politikoj de Kiŝi. La japana popolo nun kondukas grandiozan lukton kontraŭ la japania-

usona militalianca traktato. En sia batalo kontraŭ la traktato, la konscio de la japana popolo altiĝas tagon post tago, kaj pli kaj pli multe da homoj vekigis. Prezidanto Maŭ diris, ke la japana popolo havas belan perspektivon. La ĉina popolo firme subtenis, subtenas kaj subtenos la justan patriotan batalon de la japana popolo. La popoloj de Kubo kaj aliaj latinamerikaj landoj subtenas la batalon de la japana popolo, kiu siavice subtenas la batalon de la popoloj de Kubo kaj aliaj latinamerikaj landoj.

Prezidanto Maŭ diris, ke antaŭ nelonge Usono sendis U-2-an aeroplanon por enstrudiĝi en Sovetunion kaj spionadi. Ĝi estas paffaligita de Sovetunio. La sovetia popolo faris pravege. Tiu ĉi evento ankoraŭfoje malkovris la veran vizaĝon de usona imperiismo kiu preparas agresan militon sub masko de falsa paco. Ĝi plue konfirmis al la mondo la jenan veron: nenia nereala iluzio devas esti konservata pri imperiismo. Iuj priskribis Eisenhower kiel personon tre amantan pacon. Mi esperas, ke tiuj homoj estos vekitaj de ĉi tiuj faktoj.

Prezidanto Maŭ Zedong diris: Ni subtenas la okazigon de la konferenco de ŝtateĉefoj, ĉu tia konferenco estos kun aŭ sen atingoj, aŭ ĉu la atingoj estos grandaj aŭ malgrandaj. Sed la gajno de mondopaco devas dependi ĉefe de la decidema batalo farita de la popoloj de ĉiuj landoj.

Prezidanto Maŭ Zedong ankaŭ parolis pri la ĉiam kreskantaj naciaj kaj demokratiaj movadoj en Azio, Afriko kaj Latinameriko. Li diris, ke imperiismo plej timas la vekigon de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko, la vekigon de la popoloj de ĉiuj landoj. Ni devas unuigi kaj forpeli usonan imperiismon el Azio, Afriko kaj Latinameriko returnen al la loko de kie ĝi venis.

La amikoj el Japanio, Kubo, Brazilo kaj Argentino dankis Prezidanton Maŭ pro lia akcepto kaj intima parolo. Ili diris, ke ili solide unuigos por kontraŭi imperiismon kaj klopodi por venko en siaj naciaj kaj demokratiaj bataloj.

Je la fino de la akceptado, Prezidanto Maŭ proponis tostodon por la unuigo de la popolo de la mondo, por la venko de la japana popolo, por la venko de la latinamerika popolo kaj por la venko de la popolo tra la tuta mondo.

La akceptado ĉeestis Jang Ŝangkun, kandidata membro de la Sekretariejo de la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio, kaj Liaŭ Ĉengĝi, prezidanto de la Ĉina Komitato por Afriko-Azia Solidareco.

* * *

Jene estas raporto de Hinhua-Novajagentejo el Ŝanhajo datita je la 24-a de junio, 1960. — Red.

Prezidanto Maŭ Zedong kaj Ĉefministro Ĝou Enlaj akceptis en Ŝanhajo la Delegacion de Japanaj Verkistoj estratan de Hiroŝi Noma kaj havis intiman interparolon kun ili en amika atmosfero je la 21-a de junio.

Prezidanto Maŭ Zedong elmontris ke la sukcesa batalo de la japana popolo kontraŭ usona imperiismo kaj ĝiaj agentoj en Japanio, por nacia sendependeco, demokratio kaj libero estas tre granda subteno al la batalo de la ĉina popolo kaj la popolo de la tuta mondo por kontraŭi la agresadon de usona imperiismo kaj konservi mondpacon.

Prezidanto Maŭ Zedong diris, ke la vekigo de la japana popolo multe altiĝas ol antaŭ kelkaj jaroj. Vastaj amasoj de la japana popolo nun jam vidas, ke usona imperiismo estas la komuna malamiko de la ĉina kaj japana popoloj kaj ĉiuj pacamaj kaj justemaj popoloj de la tuta mondo. Tiu ĉi batalo, laŭ ĝia skalo, vasteco kaj longdaŭreco, estus ne imagebla en la pasinteco. Ŝajnas, ke la japana popolo jam eltrovis bonan metodon en la nuna situacio por kontraŭbatali la novan "Japania-usonan Sekurecan Traktaton", por kontraŭbatali la usonajn militajn bazojn kaj elpeli la agresajn fortojn de usona imperiismo, nome, unuigi kiel eble la plej vastajn fortojn escepte de la usona imperiismo kaj ĝiaj agentoj por efektiviĝi popolamasan batalon de la tuta nacio kontraŭ usona imperiismo kaj ĝiaj agentoj.


Hiroŝi Noma diris, ke la tutlanda ĝenerala striko je la 4-a de junio, en kiu milionoj da japanoj partoprenis, kun la laboristoj kiel la kerno, elmontris, ke la batalo de la japana popolo por sendependeco kaj demokratio jam eniris novan stadion. La fortoj de la japana popolo kontraŭbatalantaj la usonan imperiismon kaj ĝiajn agentojn en Japanio jam unuigis. La batalo certe ne haltos, sed daŭre antaŭenmarŝos kaj disvolviĝos.

Prezidanto Maŭ Zedong tiam diris, ke li ne kredas ke granda nacio kia Japanio povos esti longe regata de fremduloj. Li opiniis ke esperplena estas la perspektivo por la sendependeco kaj libereco de Japanio. La sendependeco kaj paco de Japanio estos garantiata post la abolo de la "Japania-usona Sekureca Traktato" kaj usonaj militaj bazoj.

Prezidanto Maŭ Zedong elmontris ke venko estas gajnata paŝon post paŝo, same ankaŭ la vekigo de la popolamasoj estas levata paŝon post paŝo. Prezidanto Maŭ deziris pli grandan sukceson al la

Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ kun la delegitaro de japanaj verkistoj estrata de Hiroŝi (la 4a de maldekstre en la unua vico).

Foto de Hoŭ Bo kaj Meng Kingbiaŭ



japana popolo en ĝia kontraŭ-usona patriota, justa batalo. Li esprimis respekton al la heroo sinifero de Miĉiko Kanba. Li diris ke Miĉiko Kanba jam fariĝis mondfama japana nacia heroino.

Ĉe la fino, Hiroŝi Noma kaj ĉiuj membroj de la delegacio esprimis elkorajn dankojn kaj ĝojon pro

la grandega subteno de Prezidanto Maŭ Zedong kaj la ĉina popolo al la japana popolo.

La akcepton ĉeestis Ke Kingŝi, urbestro de Ŝanhajo.

Ĝin ĉeestis ankaŭ japana pabatalanto Kinkazu Sajonji.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

Sur la plej altan montpinton de la mondo

Tri membroj — Vang Fuĝoŭ, Gonpa (tibetano) kaj Kju Jinhua — de la Ĉina Montgrimpa Grupo, organizita antaŭ nelonge kaj gvidata de la fama montgrimpisto Ŝi Ĝanĉun, sukcesis surgimpi en la mateno de la 25-a de majo ĉijare la plej altan montpinton Ĝolmo Lungma de Himalajamontaro, tiel nomata la tria poluso, kun alteco de 8882 metroj super la marnivelo. Per tio ili faris senprecedencan atingon de la homaro surgimpi la montpinton de la norda flanko.

La ekspedicio de la montgrimpa trupo por surgimpi la montpinton Ĝolmo Lungma komencis

je la 15-a de marto ĉijare. Per nur du monatoj, la trupanoj sukcesis ĝin surgrimpi de la norda flanko, kiun la okcidentaj montgrimpantoj opinias ĝis nun nesurirebla.

Samtempe kun la montgrimrado, iu Scienca Esplora Grupo organizita de Ĉina Montgrimpisto Ligo, entreprenis ankaŭ la unuan sciencan esploron en tiu regiono. Tiu grupo konsistis el 44 sciencistoj kaj teknikistoj el 5 universitatoj kaj 5 koncernataj instancoj. Ili venkis la malfavoran veteron kaj malfacilajn vivkondiĉojn kaj faris sciencan esploron en la regiono de proksimume 7,000 kvadrat-kilometroj oriente, okcidente kaj norde de Ĝolmo Lungma.

La unuaj malsovaĝigitaj or-simioj

Or-simio (latine: *Rhinopithecus roxellanae*) estas rara besto produktita en altmontaj kaj profundaj arbaroj de la suda parto de Gansu-provinco. Ĝia tuta korpo kovriĝas de longaj haroj orkoloraj. La felo estas malpeza, varmkonserva kaj multe valora. En 1958, Bikoŭ-popolkomunumo de Ven-gubernio, Gansu-provinco kaptis 83 orsimiojn en praarbaro kaj tuj poste, la komunumo konstruis zoologian ĝardenon kaj komencis malsovaĝigajn laborojn pri tiuj bestoj. Nun la simioj jam iom adaptiĝas al la nova medio kaj naskis 10 simiidojn ĉiuj el kiuj vivas.

P. L. A. BOMBARDAS GINMEN EN ARMITA KONTRAŬ-USONA MANIFESTACIO

Mesaĝo de la Fugian-fronta Komandejo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo al Frataj Armeanoj kaj Civitanoj en Tajvan, Penghu, Ginmen kaj Mazu

La vojaĝo de Eisenhower al la Malproksima Oriento en junio, kaŭzis ĝeneralan indignon al la aziaj popoloj. La ŝton-ĵeto de la filipina popolo, la regalo de la japana popolo per brufermita pordo kontraŭ lia vizaĝo, la manifestacioj de la popoloj de Okinaŭa kaj Koreio plene montris, kiel malamata de la popoloj estas tiu ĉi militvendisto n-ro unua. Des pli grandan indignon li kaŭzis al nia popolo per sia aroganta "vizito" al nia teritorio Tajvan. Krom la ĝenerala kontraŭ-usona semajno tra la tuta lando, la Fugian-fronta Komandejo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo publikis mesaĝon al fratoj armeanoj kaj civitanoj en Tajvan, Penghu, Ginmen kaj Mazu pri la bombardo al Ginmen kiel granda armita manifestacio kontraŭ Usono. Jene estas la teksto de la mesaĝo:

Fratoj armeanoj kaj civitanoj en Tajvan,
Penghu Ginmen kaj Mazu:

Eisenhower baldaŭ faros "viziton" al vi. Kiu venas, ne bonintencas; kiu bonintencas ne venas*. Li estas la ĉefo de usona imperiismo, same kiel Dulles en la pasinteco, neniam havis bonan intencon al vi. Antaŭ pli ol unu jaro, Dulles iris al vi kaj faris premon, por obeigi vin al la usona plano fabriki "du Ciniojn", por ke Tajvan fariĝu komplete kolonio de Usono. Tiutempe ni kanonis kaj vi rezistis la usonanojn, kaj Dulles ne povis efektiviĝi sian deziron. Kvankam Dulles mortis, tamen ne mortis la ambicio de Usono por aneksi Tajvan. La politiko de Eisenhower estas tiu sama de Dulles. Eisenhower estas nia malamiko, kaj ankaŭ malamiko de ĉiuj patriotaj fratoj en Tajvan, Penghu, Ginmen kaj Mazu.

La famo de usona imperiismo ĉiam pli kaj pli fetoras. Antaŭ ne longe, Eisenhower subfosis la Konferencon de registaraj ĉefoj de la kvar potencoj, kaj estis oponata de la tutmonda popolo. La popoloj de multaj aziaj landoj suferas de Usono tre longan kaj tre intensan subpremado kaj kontraŭbatalas Usonon ankaŭ plej forte. Eisenhower venas ĉi-foje de la oriento al la okcidento de Pacifiko, ĝuste por konservi la usonajn agresajn poziciojn en Azio, kaj pli intensigi ĝian subpremado al la popoloj de aziaj landoj. Tian "dion de pesto" oni ja bone scias kiel

"bonvenigi". Ĉie, kien Eisenhower ĉifoje anoncis "viziti", leviĝis ondoj de kontraŭstaro. Eisenhower venas ja kun malmoligita kaphaŭto†. Nepre ne pensu, ke fortaj estas la usonaj imperiistoj kaj iliaj lakeoj. Kiam ekmuĝis la popoloj de Sudkoreio kaj Turkio, tuj konsterniĝis la usonaj imperiistoj, kaj estis faligitaj Ri Sungman kaj Menderes, iliaj du fidelaj lakeoj. Usono postenigis gigantajn militfortojn en Japanio, la naci-perfida Kiŝi-registaro kun morte obstina koro intencas kontrakti militaliancon kun Usono. Sed la japana popolo tion ne konsentas, kaj luktoj leviĝas unu post alia, skuante la ĉielon kaj teron mem. Eisenhower estas publike deklarita de la heroo japana popolo kiel "persono neakceptebla", lia "antaŭira adjutanto" gustumis la forton de la popolo tuj post surteriĝo, kaj li mem estis regalata per brufermata pordo kontraŭ lia vizaĝo. Filipinoj estas jam longe regataj de Usono, sed la tiea popolo ankaŭ leviĝis kontraŭ la rabista vojaĝo de Eisenhower. Patriotaj fratoj en Tajvan, Penghu, Ginmen kaj Mazu, vi certe ne permesos al Eisenhower arogante paradi super vi. Antaŭ tri jaroj, vi sturmis la usonan "ambadorejon" en Tajbej kaj tio estas glora rekordo de la patriota batalo kontraŭ Usono. Nenian bonan finon havos tiuj kiuj agas kiel fidelaj lakeoj de Usono, fordoninte sin je alies disono. Ni scias, ke vi ne volonte toleras la ofendon de Usono. La usonanoj komplotas "aŭtonomion de Tajvan" kaj kreas oponentajn grupojn ĉe vi kio jam kaŭzis al vi sufiĉan kaprompan ĝenon. En kriza momento, la usonanoj ne konservos fidelecon al siaj lakeoj. Ri

* La frazo estas ĉina proverbo.

† T. e. vole-nevole, riskante.

Sungman kaj Menderes estas ekzemploj avertdonaj. Ĉu tiuj kiuj sekvas Usonon, povus ne senti froston en la koro vidante tiujn ĉi okazaĵojn? Ĉiuj patriotaj ĉinoj devas sin unuigi en decidema batalo kontraŭ la usonaj agresantoj.

Por subteni la justan batalon de la popoloj de aziaj landoj kontraŭ la rabista vojaĝo de Eisenhower, por subteni la justan batalon de la patriotaj fratoj en Tajvan, Penghu, Ginmen kaj Mazu kontraŭ la rabista vojaĝo de Eisenhower, por montri la malrespekton kaj malestimon al Eisenhower de la granda ĉina popolo, ni decidis: Laŭ la kutima praktikado de kanonado en neparaj tagoj, en la 17a de junio, la antaŭvespero de la alveno de Eisenhower al Tajvan kaj en la 19-a de junio, la dato de lia forlaso de Tajvan, estos okazigata ĉe Ginmen-fronto armita manifestacio kontraŭ Usono, por "akcepti kaj forsendi" lin per kanonado. La armitaj fortoj de Usono lastatempe senĉese faris al ni minacojn kaj provokojn. Tiu ĉi nia decido estas sole por fari manifestacion kontraŭ la usona imperiismo. Ĉiuj patriotaj fratoj en Tajvan, Penghu, Ginmen kaj Mazu, kiuj ne volas submetiĝi al la usona premo, certe tion aprobas. Por via sekureco, per tio ĉi ni antaŭsciigas vin pri la afero. En la tempo de kanonado, vi devas nepre resti ŝirmate en sekura zono kaj ne eliri, por



Miloj da kanonoj ektondris indigne por forpeli la "dion de pesto" Eisenhower.
Foto de Hie Tianŝuj

eviti eblan misvundon. Ankaŭ viaj ŝipoj devas atenti en tiuj ĉi du tagoj ne alproksimiĝi al la pafata zono por eviti danĝeron. Se iuj ne observos nian averton, volonte agas kiel kunkrimuloj de la agresantoj, kaj kuraĝos malhelpi la grandan armitan manifestacion kontraŭ usona imperiismo, ni nepre ilin punos severe. Ne diru, ke ni ne antaŭe admonis.

La Fugiana Fronta Komandejo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.

La 17an de jun. 1960.

Forpelu Usonan Imperiismon el Azio!

Jene estas traduko de ĉefartikolo de Popola Tagĵurnalo je la 25-a de junio, 1960.

Antaŭ dek jaroj, Prezidanto Maŭ Zedong deklaris en la 8-a kunveno de la Konsilo de la Centra Popola Registaro: "La ĉina popolo jam antaŭ longe deklaris, ke la aferoj de la diversaj landoj tra la tuta mondo devas esti irigataj de la popoloj de la respektivaj landoj mem, kaj la aferoj de Azio devas esti irigataj de la popoloj de Azio mem, sed ne de Usono. La usona agresado en Azio kaŭzos nur vastan kaj decideman reziston de la aziaj popoloj." Kiu kukurbon plantis, tiu kukurbon rikoltas; kiu fabon plantis, tiu fabon rikoltas. Jam venas la tempo por usona imperiismo por rikolti siajn mal-dolĉajn fruktojn el la semoj de malamo, kiujn ĝi

semadis en Azio dum la pasintaj dek jaroj. La ŝtormo de la firma kontraŭbatalo de la aziaj popoloj kontraŭ usona imperiismo estas pli kaj pli leviĝanta.

Antaŭ dek jaroj, la usona imperiismo eksplodigis agresan militon kontraŭ Koreio kaj samtempe invadis la ĉinan teritorion de Tajvan. Tio estis la plej grandskala agreso farita de usona imperiismo post la fino de la Dua Mondmilito. Por la batalejo en Koreio, la usonaj invadistoj mobiliziĝis trionon de sia armeo, kvinonon de sia aer-forto kaj la plejparton de sia militŝiparo, konsumis pli ol 73 milionojn da tunoj de milita materialo, kaj elspezis pli ol dudek mil milionojn da dolaroj en militelspezo. Usona



Usona imperiismo estas la komuna malamiko de la popolo tutmonda.

Pentris Ŝa Gengsi

imperiismo ankaŭ devigis 15 landojn ekspedi trupojn por partopreni ĝian kriman militon. En la invada milito al Koreio, la usonaj agresantoj aplikis ĉiajn modernajn armilojn escepte de atom-armilo, kaj eĉ faris malhumanan bakterian militon. En sia milita plano la usona imperiismo celis ne nur neniigi la orientan remparon de la socialisma tendaro — Korea Demokratia Popola Respubliko, sed, sekvante la malnovan vojon de japana imperiismo en ĝia agreso kontraŭ Ĉinio, vane esperis per unu atako strangoli antaŭ ne longe fonditan Ĉinan Popolan Respublikon. Tio estis la unua paŝo laŭ la strategia plano de Usono por superregi Azion. Jam antaŭ dek jaroj, la usona imperiismo sin malkovris kiel la plej kruela invadisto kaj la komuna malamiko de paco en Azio kaj la mondo.

Tiam la korea kaj ĉina popoloj alfrontis tre gravan elekton. Sin apogante sur la supereco en milita forto, la usona imperiismo trudis militon al la korea kaj ĉina popoloj. Ĉu la korea kaj ĉina popoloj submetiĝu al la premo de la imperiismo kaj almozpetu pacon de ĝi, aŭ staru rekte, levu armilojn kaj firme frakasu la invadan milit-planon de usona imperiismo? La bravaj popoloj de Koreio kaj Ĉinio elektis senhezite la lastan vojon, kaj defendis sian sendependecon kaj la pacon de Azio kaj de la mondo, per justa milito.

Lenin foje diris: "Kiam la malamiko estas dolore batita, li venos por paciĝo." Tiu ĉi vero estis

refoje pruvita en la korea milito. Post kiam Usono eksplodigis la invadan militon en Koreio, la popoloj de Koreio kaj Ĉinio foje kaj refoje proponis fini la militon en Koreio per paca intertraktado. Sed la usona imperiismo, revante konkeri nordan Koreion kaj poste invadi novan Ĉinion, ne volis retiri siajn diablajn ungojn. Nur post 37-monata provo de forto, kiam la bravaj popoloj de Koreio kaj Ĉinio trapikis la papertigon de Usono kaj repelis la usonajn invadantojn for de Jalu-rivero ĝis ĉirkaŭ la 38-a Paralelo, ili

estis devigataj subskribi la armistican kontrakton. Nur tiam efektiviĝis armistico en Koreio kaj estis estingita la incendio bruligita de Usono en Azio. Tial, la justa milito kondukita de la korea kaj ĉina popoloj kontraŭ usonaj invadistoj, estis ne nur batalo por defendo de siaj patrolandoj, sed ankaŭ batalo por defendo de la paco de Azio kaj la mondo. La granda venko de tiu batalo konvinke pruvis: Kontraŭ la agresaj kaj militaj agadoj de usona imperiismo, oni nepre devas, okulo-pro-okule kaj dento-pro-dento, konduki sencedan batalon, inkluzive justan militon por kontraŭstari la de ĝi bruligitan maljustan militon, kaj nur tiamaniere la nacia dependeco povas esti efike protektata kaj mondopaco defendata. La invada kaj milita plano de usona imperiismo povas esti frakasita, nur se oni ĝin rebatas ĝis kaprompo kaj sangado.

La usona imperiismo ne lasis sian buĉistan tranĉilon post la fiasko de sia agresa milito en Koreio. Depost la armistico, la korea kaj ĉina flanko fidele observadas la armistican kontrakton. La registaro de la Korea Demokratia Popola Respubliko foje kaj refoje proponis retiriĝon de ĉiuj fremdlandaj trupoj el Koreio kaj pacan unuigon de suda kaj norda Koreio. Por akceli la retiriĝon de ĉiuj fremdlandaj trupoj el Koreio, la Ĉina Popola Volontula Armeo retiris la unua mem iniciate ĉiujn siajn trupojn el Koreio. Ĉio ĉi tio montris, ke la korea kaj ĉina flanko sincere klopodas por la paca solvo

de la korea problemo. Sed la de nature agresema usona imperiismo ne nur rifuzis ĉiujn proponojn por paca solvo de la korea problemo, ne volante retiri siajn trupojn el Koreio, sed, male, senĉese ofendadis la armistican kontrakton, kaj eĉ enportis atomajn kaj gvidatajn jetarmilojn en sudan Koreion. Samtempe, la usonaj invadistoj ankoraŭ daŭre okupas la ĉinan teritorion de Tajvan kaj daŭre faras militajn provokojn kaj militajn minacojn kontraŭ Ĉinio en la areo de la Tajvan-a Markolo. La usona imperiismo cetere tutforte klopodas revivigi la japanajn militismajn fortojn por fari ilin kunkrimuloj en antaŭenpuŝado de sia agresa kaj milita politiko en Azio. Ĝi kunkolektis la Organizon de Sudorient-azia Traktato, ĉie starigis militajn bazojn, tretis suverenajn rajtojn de multaj landoj kaj planis novajn agresmilitojn. En suda Vjetnamio ĝi subtenas la pupan reĝimon de Ngô-dinh-Dziem en ekspansio de armado kaj preparado de milito, en Laŭso ĝi instigis civilan militon, en Kamboĝo ĝi faras renversajn agadojn, subfosante la armistican kontrakton de Hindoĉinio. Ĉiuj ĉi tiuj agresaj kaj militaj agadoj de usona imperiismo estas la fonto de streĉeco en Azio kaj serioza minaco al la tiea paco.

En la pasintaj dek jaroj, la usonaj imperiistoj faris ĉiajn malbonojn en Azio, kun feroceco superante tiun de ĉiuj aliaj imperiistoj, kiuj iam faris koloniisman ekspansion en Azio en la pasinteco. Neniu el la aziaj landoj ekspedis unu solan soldaton al Usono aŭ okupas unu solan colon da usona tero; sed la usona imperiismo havas centojn da miloj da armeanoj garnizonantaj en diversaj landoj de Azio, ŝanĝis la teritoriojn de multaj landoj en siajn militajn bazojn, kaj subtenas aron da plej putraj, reakciaj kaj barbaraj pupreĝimoj, kaj faras plej kruelan invadon kaj subpremado kontraŭ la popoloj de la aziaj landoj. La usona imperiismo fariĝis "dio de pesto" portanta katastrofojn, mizeron kaj doloron al la aziaj popoloj. Sed la ekstreme senbrida feroceco de usona imperiismo ne povas ne iri al sia malo. Ĝi ĉiam pli klare komprenigas la popolojn de aziaj landoj, ke restas al ili neniu alternativo, kaj restas al ili nur leviĝi kaj batali kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj, por gajni kaj konservi la nacian sendependecon, por konservi pacon kaj trankvilon en Azio kaj por vivi. Ĝuste tial, leviĝas ĉijare furioza ŝtormo de la aziaj popoloj kontraŭ la usona imperiismo kaj la usona imperiismo metis sin en situacion ĉirkaŭatan de malamikoj en ĉiuj flankoj.

La usona imperiismo estas tre feroce kaj bruta malamiko. Ĝi havas grandan kvanton da ŝtalo, kolosajn militekipaĵojn kaj ankaŭ atomajn armilojn. Ja estas ne facile aŭdaci sin levi por batali kontraŭ ĝi. Sed la okazintaĵoj en la pasintaj dek jaroj en Azio foje kaj refoje pruvis, ke la usona imperiismo estas nur papera tigro, forta ekstere sed malforta interne, kaj estas tute venkebla. Tion pruvis ankaŭ

la fakto, ke la popoloj de Koreio kaj Ĉinio venkis la usonajn agresantojn kaj devigis ilin akcepti la armisticon. Tion pruvis ankaŭ la fakto ke firma batalemo de la hindoĉinia popolo detenis la usonan imperiismon de rekta partopreno en la Hindoĉinia Milito kaj frakasis ĝian intrigon por daŭrigi kaj plivastigi tiun militon. Lasttempe, fidela lakeo de Usono Ri Sungman estas faligita de la tajdo de la patriota batalo de Sudkoreia popolo, ĝia alia fidela lakeo Manderes estas faligita de la tajdo de la patriota batalo de la turka popolo, Eisenhower kiu intencis viziti Japanion estas rifuzita de la japana popolo eksterporde, kaj Kiŝi estas finfine devigita ekŝiĝi — ĉio ĉi tio montras ke la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj neniel estas tiel fortaj kiel ili aspektas. Kiu posedas grandan potencon kaj estas nevenkebla, estas la vekiĝinta, unuiĝinta kaj por batalo leviĝinta popolo. Tio ĉi ne povas ne ege plifortigi la memfidon kaj decidemon de la popoloj de la aziaj landoj por batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. La historio de Azio evoluas nun en nova direkto: ne la subpremataj popoloj en Azio timas la usonan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn,



Eksplodoj ĉiele kaj surtere Pentris Ĝeng Venĝong

sed la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj timas la vekigintajn aziajn popolojn kiuj jam leviĝis por bataladi.

La ŝtormo nun leviĝanta en Azio kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj forte skuas la usonan agresmilitan sistemon en Azio. Usono, kiu entreprenis agresadon en Azio dum dek jaroj, nun estas gustumanta siajn maldolĉajn fruktojn. Kiom ajn da mono Usono elspezis, kiom ajn da trupoj ĝi alsendis, kiajn ajn pupojn ĝi starigis, ĝi neniel povas malhelpi la vekigon kaj kontraŭstaron de la aziaj popoloj. La lastatempa vojaĝo de Eisenhower al la Malproksima Oriento plej vivece pruvis, ke la usona politiko de agresado kaj milito en Azio jam trafis hontindan fiaskon. Malgraŭ ke la uson-japanaj reakciuloj perforte efektivigis la Uson-Japanian Mlilitaliancan Traktaton, la japana popolo tamen decidis firme daŭrigi ĝisfine la batalon por frakasi tiun ĉi militan aliancion. Malgraŭ ke la ondoj de batalo de la sudkoreia kaj turka popoloj nun verŝajne iomete mildiĝis, tamen tio ĉi estas nur ondvalo antaŭ la venonta pli alta ondo. Malgraŭ ke iuj lokoj en Azio ŝajnas relative kvietaj supraĵe, tamen fakte estas brulantaj la indignaj flamoj de la tieaj popoloj, kaj vulkanaj erupcioj estas en formiĝo. Kvankam la bataloj estos longdaŭraj kaj malfacilaj kaj la vojo estas malglata kaj zigzaga, tamen, certe venos la tago en la historio de Azio, kiam la tuta agresmilita sistemo de usona imperiismo en Azio disfalos komplete en la flamegoj de la ĉiam pli ardanta batalado de la aziaj popoloj.

Certe la usona imperiismo ankoraŭ ne retiriĝis antaŭ la malfaciloj. Ri Sungman estas faligita de la sudkoreia popolo, sed Usono ankoraŭ intencas anstataŭigi la malnovan pupon per la nova Huh Ĉung.

(Daŭrigo de p. 163)

kiuj subfosas la sanon de la popoloj, kaj forpasis por ĉiam la malgaja stato de dezertiĝo de vilaĝoj kaŭzita de epidemioj.

Kaj la vasta disvolviĝo de higienaj aferoj alportis al la nacimalplimulto tute novan aspekton de prosperado de ilia loĝantaro. Ĉe kelkaj nacimalplimultoj, kies loĝantaro delonge malkreskadis antaŭ la Liberiĝo, nun montriĝas prospera stato de kreskado. Ekzemple, la mongoloj en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio plimultiĝis per pli ol 300,000 personoj sole en la 11 jaroj de 1947 ĝis 1958, t.e. proksimume 36% de la origina popolnombro, en Gujĝou-provinco la loĝantaro de mjaŭo, bujio k.a. en tute 10 nacimultiploj kreskis per pli ol 420,000 personoj de 1953 ĝis 1958, t.e. proksimume 10.6% de la origina nombro. Heĝeoj, kiuj estas la plej malgranda nacio en Ĉinio,

Nobusuke Kiŝi ekŝiĝis devigate, kaj Usono ankoraŭ intencas starigi iun duan Kiŝi. Eisenhower renkontis severan baton de la aziaj popoloj, Nixon kaj Dillon kriaĉis unu post la alia "reakiri la perditajn poziciojn" kaj usonaj militaj ĉefoj urĝeme kunvenis por pristudi militpreparan planon de Usono en la Malproksima Oriento. Sed malgraŭ ĉio, Vaŝingtono droniĝas en neniel kaŝebla pesimismo kaj malespero. Tio ĉi ja estas tute nekomparebla kun la aroganta kaj impertinenta sinteno de usona imperiismo antaŭ dek jaroj.

Azio estas en grandioza ŝanĝiĝo. Antaŭ dek jaroj, la korea kaj ĉina popoloj heroe batalis kontraŭ la usona imperiismo vizaĝo-al-vizaĝe; hodiaŭ la popoloj de pli multaj aziaj landoj vekigis kaj kontraŭbatalas la usonan imperiismon. Antaŭ dek jaroj, la usona imperiismo ankoraŭ revis pri batalo kontraŭ azianoj per azianoj; hodiaŭ ĝi estas ĉirkaŭatakata el ĉiuj flankoj de la aziaj popoloj. La popoloj de la aziaj landoj kiuj subtenas unu la alian en batalado estas nun formantaj unuiĝintan fronton kontraŭ la usona imperiismo. Se la usona imperiismo ankoraŭ povis kelkloke iel efektivigi siajn planojn de agreso kaj milito en pasintaj dek jaroj, la venontaj dek jaroj tamen estos jardeko dum kiu la usona imperiismo suferos kaprompiĝon kaj sangadon ĉie en Azio. La ĉina popolo fine certe rekiros sian teritorion Tajvan; la japana popolo sin liberigos pli aŭ malpli frue el sub la usona regado kaj aperos kiel vere sendependa, demokratia kaj paca nacio en Azio. La popoloj de Koreio kaj Vjetnamio realigos fine reunuiĝon de siaj patrioj. La popoloj de Turkio, la Filipinoj kaj aliaj landoj frakasos la sklavigajn jugojn de usona imperiismo kaj akiros veran sendependecon. Azio estas Azio de la azianoj. Ĉiuj aziaj popoloj unuiĝu kaj forpelu la usonan imperiismon el Azio!

nombriĝis antaŭ la Liberiĝo nur 400, preskaŭ malaperontaj kiel nacio, nun plimultiĝis ĝis 606, kreskante per pli ol 50%. Prospero kaj multnombriĝo de la popolo estas delonga deziro de niaj popoloj diversnaciaj. Ĝi efektivigis nur hodiaŭ, sub la gvido de la Partio kaj prezidanto Maŭ, tial ilin prikantus elkore la popoloj de nia lando:

Kiu konstruis la vojon al feliĉo?

Kiu kreskigis la verdajn pinojn?

Kiu tempo estas la epok' de or'?

Kaj kio por ĉiam pasis for?

La Partio konstruis la vojon al feliĉo,

La popolo kreskigis la verdajn pinojn,

La Maŭ-Zedong-tempo estas la epok' de or',

Kaj la mizero por ĉiam pasis for!

—popolkanto de la Interna Mongolio

Adiaŭ, Dio de Pesto Eisenhower

DIO de pesto Eisenhower, la n-ro A-1 ekzekutisto en la mondo nuntempa, fininte sian naŭ-tagan vojaĝon en la Malproksima Oriento, jam hejmeniris elreviĝe kun terurita animo. La tutazia popolo devas multe danki tiun ĉi usonan prezidanton, ke li eĉ ne ŝparis klopodadon por fari longan vojaĝon al Azio antaŭ sia baldaŭa ekziĝo, kaj kompetente plenumis la taskon de instruisto per negativaj ekzemploj, donante al centmiliono azia popolo tre bonan okazon por fari antiimperiisman ekzercadon. Kaj ni scias, ke, se mankas korekta gvidado de la instruisto per pozitivaj ekzemploj, unuflanke, kaj senĉesa devigo kaj ripetataj pruvoj de la instruisto per negativaj ekzemploj, aliflanke, kaj se oni ne faras multfojajn praktikajn ekzercojn, la popolo kaj ilia batalo ne povas venki.

Tro malalte taksu la fortojn de la popolo, sed tro alte, — la sian, estas la komuna karakterizaĵo de la burĝaj reakciuloj kun vidpunkto de historia ideismo. Eisenhower, nature, ne estas escepto. Malgraŭ ke lia vera vizaĝo de militinstiganto jam estas foje kaj refoje malkovrita, li tamen ĉi foje venis al la Malproksima Oriento ankoraŭ ŝajnigante sin misiisto de paco, ŝtopinte la poŝojn per vico da magiaj vortoj “libero”, “justeco”, “paco”, “digno”, “per la popolo”, “por la popolo”, “helpoj”, “amikeca interligo” ktp. por trompi la popolon. En la sama tempo, li movis la teran, maran kaj aeron armeojn kaj la tutan bandon de

sekretaj agentoj por timigi la popolon. Tiu ĉi reprezentanto n-ro 1 de la usona imperiismo, surbaze de sia vidpunkto de historia ideismo, eĉ kredas, ke li povas trompi kaj subigi la azian popolon. Tial spite al ĉiuj kontraŭstaroj li venis al la alia bordo de Pacifiko riske kaj senhonte. Sed kia estis la rezulto? La rezulto estis:

Li iris al Filipinoj, kaj la filipina popolo regalis lin per strikoj kaj ŝtonpecoj.

Li iris al Tajvano, kaj la ĉina popolo lin akceptis kaj forsendis per granda armita manifestacio de salvado de miloj da kanonoj.

Li iris al Koreio, kaj la korea popolo forpelis lian fidelan lakeon Ri Sungman.

Lia plej ĉefa intenco estas viziti Japanion por subteni Kiŝi-n. Sed la heroo japana popolo solide fermis la pordon anatŭ lia nazo. Sekve de tio Kiŝi, lia lakeo fariĝis ankoraŭ pli ŝanceliĝanta.

Tiu ĉi instruisto per negativaj ekzemploj donis al la popoloj de Azio kaj de la tuta mondo kelke da signifoplenaj lecionoj per sia mirinda instrumentado.


Li pruvis al homoj per “interparoloj”, “kunaj komunikadoj”, “inspektadoj”, “publikaj paroloj”, “plifortigo de militaj pozicioj” kaj aliaj rimedoj, ke la usona imperiismo neniam ŝanĝis sian rabistan karakteron, sed male ĝin plifortigis, ke la usona imperiismo estas ververe la komuna malamiko de la

KONSTERNIĜO DE EISENHOWER EN AZIO


Pentris A. Lam

1. Mi alvenis al Filipinoj ĝuste je la maturiĝo de kokosoj.





2. Fuĝi estas monto fama, tamen ĉarma nur rigardate malproksime.



3. Pluvego ĉe Tajvan-markolo.

azia popolo kaj de la tutmonda popolo, kaj ke Eisenhower mem estas ververe la plej fidela kaj plej aŭtoritata reprezentanto de la usona imperiismo. La Pentagono estas nur instrumento de la usona mono-pola kapitalo kaj ĝia reprezentanto dio de pesto Eisenhower, sed tute ne inverse.

Cu Eisenhower tiu "instruisto" faros krom tion por instrui la popolon? Cu li jam fine konsentis sian malvenkon kaj volontos ne plu intrigi? Ne, intrigi—malvenki—denove intrigi—denove malvenki—fine, pere! Jen estas regulo de l' imperiismo kaj ĉiuj reakciuloj. Cu Eisenhower, ĉu Rockefeller, ĉu alia sekvonta prezidanto el la Respublika Partio aŭ el la Demokrata Partio, ĉiuj ili ne agos kontraŭe al tiu ĉi regulo. Cu oni ne aŭdis ke la usonaj imperiistoj nun bruegas por atribui la fiaskon de la vojaĝo de Eisenhower en la Malproksima Oriento al t.n. "minaco de komunismo" kaj al t.n. "minaco de Ĉinio"? Tio ĉi estas ja granda mensogo de la usona imperiismo, kaj antaŭsigno de plua kombinado de

* La lasta eliro (hispane).
** Alie nomata Blanka Domo

S. J. Zee

*Vojagis la moderna Don Kihoto
Kun kapo plena de hiltiraĵ revoj,
Fidela al la kavaliroj devoj,
Por savi la kolegojn de bankroto.
La militaron ombris olivbranco.
Sidanta trone sur nuklea bombo
La sonĝis dolĉe jam pri l' hekatombo.
Herolde flugis lia Panza Sanko.
Sed li forgesis tute pri l' popolo.
Kiel rabia hundo sub stonumo,
Li dronis tuj en protest-maro vasta,
Kaj honkvovita kun rompita kolo
Noktue retirigis en mallumon.
Tiel finigis la salida lasta.*

*Fa ultima salida**

Eisenhower serioze "instruis" homojn per siaj praktikaj agadoj: la popolo absolute ne devas havi ian ajn fantazian revon pri la usona imperiismo kaj pri dio de pesto Eisenhower mem. Se iuj havus ankoraŭ tiajn revojn (kiel ekzemple tiuj, kiuj asertas senbaze ke la naturo de imperiismo jam ŝanĝiĝis kaj ke Eisenhower estas mististo de paco k.c.), jen tiu ĉi usona prezidanto trege ĝustatempe trakasas ĝistunde la revon per diversaj militpropovokoj kaj agresadoj kiuj povas plene evidentiĝi hian imperiisman naturon. Tiu ĉi usona prezidanto uzante ankaŭ rimedojn kiaj vola-ne-vola ŝanĝo de sia antaŭfiksita plano (pri la vizito al Japanio) kaj esprimo de "bedaŭro" (pri la akcepto kaj forsendo per kanona salvado fare de la Ĉina Popola Libera Armeo) precipe draste "instruis" la popolojn de Azio kaj de la tuta mondo, ke la popola forto finfine estas la decida faktoro, la popolo povas trakasi ĉiujn intrigojn de la imperiismo, venki kaj subigi ĝis ekstermi la imperiismon, nur se ili unuigas kaj faras firman, neflekseblan batalon.

aliaj novaj intrigoj. La usona imperiismo revas vane per tiu tute senvalora malnova recepto rompi la unuiĝon interne de la popoloj de aziaj landoj, rompi la unuiĝon inter la popoloj de Ĉinio kaj tiuj de aliaj aziaj landoj. Krome, ni devas noti ke la malsukceso de dio de pesto Eisenhower por efektivi la viziton al Japanio estas lia plej granda fiasko. Tamen, ni devas ankaŭ prikalkuli, ke por efike protekti sian proprajn inetresojn, estas tute eble por la usona imperiismo viktimiti Kiŝi-n kaj lin anstataŭi per alia marioneto, por trompi la japanan popolon kiel ili faris en Sudkoreio, kaŝe anstataŭante Ri Sungman per Huk Ĉun.

Estas utile, ke pretere ni ekrigardu la renegatan fizionomion de la jugoslavaj modernaj reviziistoj. Dum la lastaj tagoj, Tito-klika senĉese bruaĉis por ŝminki la usonan imperiismon. Ili diraĉis, ke se ne estus okazinta lastatempe la ŝanĝiĝo de la monda situacio, "la vizito de Eisenhower al Japanio, povus esti varme akceptita, kaj li estus povinta doni multajn konsolajn vortojn al la ege suferantaj japanoj." (laŭ la ĵurnalo "Politiko" je la 18a de junio); ke la usona prezidanto celas en sia vizito al Japanio efektivi "la tiaman politikon de la usona registaro malstreĉi la mondan situacion kaj solvi disputojn pere de leĝa sistemo." (laŭ la ĵurnalo "Batalo" je la 18a de junio). Ili eĉ senhonte minacis al la justa batalado de la japana popolo kaj incitis malpacon, dirante: "per rifuzo de la vizito de prezidanto Eisenhower, la manifestaciintoj ofendis la popolon de la lando, kaj ties popolo ilin ne pardonos. Krome la Uson-Japania Sekureca Traktato egale validiĝos, eĉ sen ratifo:" (laŭ la ĵurnalo "Batalo" je la 17a de junio). Jen vere tipa fizionomio de la lakeoj de la usona imperiismo! Ke kontraŭante la usonan imperiismon, ni devas


ankaŭ ĝisfunde frakasi la modernan reviziismon, ĉu tio estas ankoraŭ dubebla?

La popoloj de Ĉinio, de Azio kaj de la tuta mondo povas rivevi el la rabista vojaĝo de Eisenhower instruon profundan kaj utilan, kaj koni pli klare, ke la usona imperiismo estas la plej malica malamiko de la popoloj de la mondo, ke la usona imperiismo vere estas papera tigo, kaj ke nur la unuiĝinta forto kaj batalado de la popoloj estas la decidiga faktoro por gajni la venkon en la batalo kontraŭ la milita, agresiva politiko de la usona imperiismo kaj en tio por defendi la mondpacon. Ĉio ĉi tio pravas, en plej preciza signifo, la saĝon kaj grandecon de la penso de kamarado Maŭ Zedong, la granda gvidanto de la ĉina popolo.



4. Ne estas sufiĉa loko en malgranda Okinaŭa por mia surteriĝo.

5. La korea popolo eĉ intencis min reteni.




Hinhua:

Ŝtormo en Azio

“Ŝtormo en Azio” estas dokumenta filmo spegulan-ta la nunan pli kaj pli altiĝantan tajdon de kontraŭ-usonaj bataloj en Azio kaj malkaŝanta la veran milit-preparon sub falsa pacdeziro kaj la veran agresadon sub ŝajnigita gesto por malstreĉeco de la mondsituacio fare de la usonaj imperiistoj. Per raraj materialoj de realaj faktoj la filmo raportas kun emfazo la heroan, neflekseblan batalon de la japana popolo, kiu ne volas toleri la subpremon de la usona imperiismo nek volas esti puŝata en la militan abismon de la usonaj kaj japanaj reakciuloj. Per prezento de la renverso de la regado de Ri Sungman kaj Menderes fare de la sudkorea kaj turka popoloj, la filmo montras la senkompromisan antagonismon kaj la decidemon por batali ĝis la fino de la aziaj popoloj kontraŭ usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj.

Sur la ekrano oni vidas la manifestaciajn scenojn de la japana, sudkorea kaj turka popoloj kontraŭ usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj, batalantaj kontraŭ

Bravaj manifestaciantoj en Sudkoreio kaptis tankon en sia batalo kontraŭ Ri Sungman.





La informejo de usona imperiismo en Tajvan estas detruita de la indignaj popolamasoj, pro la murdo de Liu Zijan en 1957.

malamikoj sub la atakoj per la larmigaj gasbomboj, akvoŝpruciloj kaj diversaj armiloj. Oni povas vidi en tiu ĉi filmo scenojn pri bat-mortigo kaj bat-vundo al manifestaciantaj japanoj fare de la uson-japana reakciularo en la sanga tragedio de la 15-a de junio, kiu incitis la japanan popolon al pli alta indigno kontraŭ ili. La filmo montras ankaŭ la konfuziĝon de Hagerty, la antaŭira adjutanto de Eisenhower, ĉirkaŭata de la indignanta japana popolo; la manifestaciantajn japanajn popolamasojn, rompantajn la dratbarilon de usona militbazo en Japanio spite al la minaco de usonaj militaj aeroplanoj; kaj la kuraĝigajn scenojn de sudkorea popolo, kiu renversas la regadon de la marioneto Ri Sungman, batalakiras la tankojn destinitajn por ilin subpremi kaj faligas la bronzan statuon de Ri Sungman.

La scenoj pri tio de la Kiŝi-registaro, lakeo de la usona imperiismo en Japanio, fine demetis maskon de falsa demokratio, kaj perforte forigis la deputitojn de opoziciaj partioj el la parlamento per policanoj

Hagerty forfuĝanta en helikoptero de la aerdromo en Tokio plena de indignaj manifestaciantoj.





Tridek mil milicianoj en Tiangin, ĉefurbo de Hebej-provinco, kunvenas por fari manifestacion kontraŭ usona imperiismo.
Foto de Ĝang Jenghua

kaj kanajloj por arbitre kaj kontraŭleĝe proklami la akcepton de la Japan-usona Milit-traktato, kaj ĉiuj skandaloj kaj naciperfidaj agadoj de Kiŝi en komploto kun ceteraj lakeoj grandaj kaj malgranaj, estas montritaj en tiu ĉi filmo.

En tiu ĉi filmo, oni povas ankaŭ vidi ŝajnigitan "kurieron de paco" Eisenhower inspektanta kun granda intereso la usonan eksperimentejon de gvidataj jetarmiloj; la usonajn rabistojn konstruantaj ĉie en Japanio militajn bazojn, farantaj militajn manovrojn, armantaj japanajn armeon, militŝiparon kaj aerajn fortojn, kaj ĉiamaniere revivigantaj la japanan militarismon. La fare de Usono armado de okcidenta Germanio per gvidataj jetarmiloj por revivigi okcident-germanan militarismon, la invado de usonaj aeroplanoj kaj militŝipoj al ĉina teritorio mara kaj aera, la okupado de nia sankta teritorio Tajvan fare de Usono kaj milita trejnado kaj ekipado de la trupoj de Ĉiang Kajŝek per usonaj oficiroj kaj municioj, estas ankaŭ montrataj en tiu ĉi filmo.

Japanaj popolamasoj indigne manifestacias kontraŭ Kiŝi kaj la Japani-usona Milit-traktato.



La fakto, ke la trupoj de la ĉinaj volontuloj kaj de la popola Koreio venkis la usonajn invadantajn trupojn sur la korea fronto, trapikis, antaŭ la popoloj en la tuta mondo, la papertigron—Usono, kaj rompis la superstiĉon pri ĝi. La filmo registris la faktojn de la persona inspektado ĉe la 38-a paralelo de J. F. Dulles, la mortinta usona militinstiganto, kaj de la tuj sekvinta usona invadmilito en Koreio; kaj de la subpremado de la usona invada flamo fare de la fortaj kanonfajroj de korea armeo kaj ĉinaj volontuloj, kiuj venke rebatis la plej furiozan malamikon sur la tuta mondo. La filmo registris ankaŭ faktojn pri entuziasmaj popolamasaj kampanjoj en Ĉinio kaj aliaj landoj por kontraŭi la militan intrigon de la usona imperiismo kaj subteni decideme la bravajn batalojn de japana, sudkorea kaj turka popoloj.

La fama konkludo de Prezidanto Maŭ pri la karakterizo de la nuna tempo, ke "orienta vento superas la okcidentan" kaj "la popolo estas la decida faktoro" estas vive pruvita en tiu ĉi filmo.

Turkaj popolamasoj ĉirkaŭis Menderes kaj postulas lian ekŝigon.





Kontraŭ-usonaj raport-operoj estas prezentataj sur la Popola Placo en Ŝanhajo.

Foto de Jang Botaŭ kaj Hia Daŭling


Ĵen Gi:

Hurlo de Ŝanhajaj Laboristoj

En la vespero de la 21-a de junio aŭdiĝis kontraŭusona hurlado el la sesetaĝa kultura palaco de ŝanhajaj laboristoj, kiu staras en la centro de Ŝanhajo. Pli ol 2,000 laboristoj ĵus fininte sian taglaboron alvenis ĉi tien kun tamburoj, akordionoj kaj plumoj por prezenti teatraĵojn, kanti kantojn kaj verki poemojn, prozojn kaj pentraĵojn, kaj per tio deŝiris la pseŭdo-pacan surtuton de la usona imperiismo kaj forte kondamni la invadan krimon de la dio de pesto Eisenhower.

Tondras la ataka tamburado kaj salve pafigas miloj da pafiloj—la malamaj flamoj ŝprucas direkte al la usonaj imperiistaj rabistoj, por ilin bruligi, piki kaj moki. Jen en la teretaĝa teatro, laboristoj de la Ŝanhaja Elektrokabla Fabriko estis prezentantaj humor-dialogan teatraĵon *Vojaĝo de la Rabistoj*. Sur la scenejo oni vidis unu fiulon kun okuloj de rato kaj brovoj de ŝtelisto, portantan sur la kapo nigran cilindran ĉapelon, sekvatan de sklavaspekta groteskulo. Ili ŝtele iras unu post la alia ĉirkaŭrigardante ĉe ĉiu paŝo. Oni tuj rekonis, ke ili estas Eisenhower, la milit-vendisto kaj lia buldogo Hagerty en ilia rabista vojaĝo al la Malproksima Oriento. Terurigita de la antiusona tajdo de la popolo, subite blekis la buldogo.

“Kia sono tio estas?” demandis panike aĉa Ike. Timsaltis pro ekdemando de la mastro kaj tuj respondis la buldogo: “Salutaj pafoj.” Sed pli kaj pli



Ŝenjang-aj artistoj batalas kontraŭ usona imperiismo per siaj penikoj.

Foto de Ĝu Mej

furiozas la kanonado. La du lupoj timblekis: "Ne, ne. . . Ni estas perditaj!"

Tiam aŭdiĝis fortaj kaj decidemaj voĉoj el post la kuliso: "For de Tajvan, aĉa Ike! Bombardu! For la usona-japanan militaliancan traktaton! Bombardu!"

La du bestaĉoj ekkriegis konfuzite: "Dio gardu nin! . . . Gardu nin ĝis hejmo!"

Tiu ĉi novstila humordialoga teatraĵo estas verkita de Ĉeng Ĝenjuan, laboristo de la Ŝanhaja Elektrokabla Fabriko. Li mem kaj k-do Vang Bin, sindikata kadro de lia laborejo, ludis la rolojn de Hagerty kaj Ike respektive. Vidinte la senĉesajn mokridojn de la spektantoj, ili diris: "La sukceso devenas ne de nia prezentado, sed de tio, ke la du fiuloj estas vere tro malpuraj kaj tro malbonodoraj."

Dum lastaj tagoj, la laborantoj de la Ŝanhaja Elektro-kabla Fabriko verkis multajn poemojn, pentraĵojn kaj literaturajn programerojn por rebati la agresadon de la usonaj imperiistoj. Multaj laborantoj en la fabrikoj ankaŭ kreis novajn normojn de altkvalita kaj bonkvalita produktado kiel praktikan agadon por rebati la usonan imperiismon.

En la kultura ripoza salono en la unua etaĝo, oni estis prezentanta la ŝanhaj-operon *Sanga Ŝuldo*. Sur la sceno, indignanta homamaso krias kontraŭ-usonajn sloganojn alte tenante flagetojn kun la surskribo "For la Kiŝi-registaron!" Ili estas la japanaj studentoj manifestaciantaj sur strato de Tokio. Tiuj patriotaj studentoj renkontas sangan subpremon de Kiŝi-registaro, fidela lakeo de la usona imperiismo. Estas mortigita dum la manifestacio senkulpa studentino Miĉiko Kanba. Pro tio des pli koleriĝas la studentoj manifestaciantaj. Ili laŭte krias: "sangon pro sango!" La prezentita kruelajo de la usona-japana reaktularo ege indignigis la spektantojn, formante kulminon de la teatraĵo.

La dramo *Sanga Ŝuldo*, estas verkita en unu nokto de laborantoj de la Unua Komerca Buroo de Ŝanhajo, post kiam ili aŭdis kun ne retenebla indigno, pri la sanga subpremo de Kiŝi-registaro kontraŭ la anti-usona batalo de la japana pololo kaj la morto de Miĉiko Kanba. Dum la prezentado, ili estis ĉiam indignantaj. Tial ili bone respegulis la bravan anti-usonan emociion de la japana popolo. Pri la viktimiĝo de Miĉiko Kanba estas verkitaj jam multaj dramoj, kantoj kaj aliformaj literaturaĵoj de laboristoj kaj kulturaj laborantoj en Ŝanhajo kaj estas prezentataj ĉie en la urbo.




Pekin-opera trupo surscenigas la armitan demonstracion ĉe la fugian-a fronto kontraŭ usona imperiismo. Foto de Gu Dehua

Kiam la spektantoj indignigitaj de la invado de usonaj imperiistoj aŭdis, ke partoprenos la prezentadon la Fugian-provinca Delegacio por la Festivalo de Teatraĵo-prezentado de Laboristoj kaj Oficistoj, t.e. delegacio venanta de antaŭ-posteno de la anti-usona batalo, ili salutis la heroojn per longa kaj ŝtorma aplaŭdado. La tria fratino de la famaj "Dek Fratinoj sur la Fronto" kaj la fama "Juna Okavoja Armeano" mem, ambaŭ partoprenis la prezentadon.

Leviĝas la kurteno. Ĉe la vasta marbordo du gardstarantoj firme staras sur roko kaj la leviĝanta suno prilumas iliajn vizaĝojn. Ĝoje saltas kaj kolektas konkvojn sur la marbordo areto da jun-pioniroj kun pomsimilaj vangoj. Jen subite alflugas obusoj, kaj unu el la knaboj estas mortigita. El post la kuliso aŭdiĝas tondraj voĉoj: "La Kiang-kajŝek-bando subtenata de la usona imperiismo bombardas niajn pacajn loĝantojn. Niaj trupoj decidas doni severan punon al la kruelaj malamikoj." Tio okazis en la 23-a de aŭgusto de 1958. Pli rapide ol dirate, fulmas tuj sur la fono de blua ĉielo senĉesaj ruĝaj lumstrioj. La spektantoj en la tuta teatro ĉu sidantoj, ĉu starantoj, tondre aplaŭdas, kvazaŭ tio ne estus aplaŭdoj, sed bombardo de nia armeo ekstermanta la usonajn imperiistojn kaj ĝian lakeon—la Kiang-kajŝek-bando. La milicanoĵo ĉe la fronto, la "Dek Fratinoj" kaj la knaboj, ĉiuj sinjetas en la batalon, unuj alportas obusojn aŭ akvon, aliaj gardstaras ĉe la postenoj, ĉiuj indignantaj kontraŭ la komunaj malamikoj. Tio donas impresojn al la spektantoj, ke ili kvazaŭ ne estus en la teatro, sed sur la fronto, ke ili ne spektus teatroprezentadon, sed partoprenus persone batalon.

En la konkursejoj de poemoj, pentraĵoj kaj prozoj, ritme sonas la poemodeklamon akompananta tamburado. Vere, "unu verso estas unu kuglo", ĉiuj versoj trafas la mortan punkton de la usona imperiismo.

Aŭskultu, jen la poemo *Kontraŭbatali la rabiston* improviziita en la konkursejo de Ĝang Guanglej, juna laboranto de Aŭgust-unua Fabriko de Kinematografaj Maŝinoj:



Ekspozicio de Artajoj kontraŭ Usona Agresado por Liberigo de Tajvan kaj Defendo de Mondpaco malfermiĝis en Pekino.

Foto de Ĝu Li-jong

*Al la pesto-di' "bonvenon"
Larĝe ridas la kanonoj.
Deca donaco pretiĝas—
Bombardon komencu!*

*Bone trafis la obusoj,
Jam defalis la pac-surtuto.
Eknudiĝas Ike—
Jen rabisto!*

*Dancas la drakego orienta,
Kaj ondegojn eklevas la maro.
Se li veni kuraĝus refoje,
Trafos lin fatala fino.*

Eisenhower estas nudigita de poemoj, verson post verso, kaj stultigita de ĉiu bato de la tamburado. Eksplodis ĉiam entuziasmaj aplaŭdoj ĉiu poemo-deklamo.

Ĉiuj poemoj, pentraĵoj pendantaj sur la muroj de la konkursejo malkasis kaj mokis la invadajn krimojn de la usonaj imperiistoj. En la karikaturo "Trilogio de la vojaĝo de Ike en la Malproksima Oriento", konsistanta el tri malgajaj fizionomioj de Eisenhower, la pentrinto bildigis la ekveturon per aeroplano, la ricevon de ŝtonjetoj kaj kuŝiĝon sur tero de la dio de pesto. Kaj li donis al la tri pentraĵoj titolojn: *Fi!*, *For!* kaj *Fin!* respektive. Ili trafe mal-

Huang Hianliu:

Nova alttajo de akvoutiliga

AKVOUTILIGA konstruado estas unu el la ĉefaj faktoroj por garantii riĉan agrikulturan rikolton. La pligranda rikolto akirita en Ĉinio en 1959, post la venko kontraŭ la maloftaj naturaj katastrofoj, estas nedisigebla kun la atingoj de akvoutiligaj konstruadoj en la jaroj 1958 kaj 1959. Nur en unu jaro de septembro, de 1958 ĝis septembro, 1959 estas efektivigitaj 14,600,000,000 kubometroj da ter- kaj ŝton-laboroj de konstruoj, estas haltigita ter-eroziado en areo de 80,000 kvadratkilometroj, kaj irigaciebligis ĉ. 4,600,000 hektarojn da kampoj (pri la tuta atingo oni vidu koncernan artikolon sur p. 154 de nia gazeto n-ro 5, 1959). Pli grava estas tio, ke el la laboroj de la akvoutiligaj konstruadoj, ni resume eltiris la principon, ke akvoregado devas baziĝi ĉefe sur akvo-

konservado, malgrandaj konstruaĵoj kaj popolamasa mem-entreprenado. Tio kreis favoran kondiĉon por estontaj pligrandskalaj akvoutiligaj konstruaĵoj.

Nova alttajo

Alttajo de pli grandskala akvoutiliga konstruado disvolviĝas tra la lando ekde oktobro lastjara. Norde de Hejlonggiang-provinco suden ĝis Hajnan-insulo, kaj oriente de la marbordo okcidenten ĝis Tiansan-montaro en Hingiang Ujgura Aŭtonoma Regiono, sur milionoj da akvoutiligaj konstruejoj ĉie flirtas ruĝaj flagoj, kaj 70,000,000 konstruantoj batalas kun alta spirito kaj senkompara energio. Nek ventegoj kaj neĝoŝtormoj, nek solida glacio kaj frostigita tero povas haltigi la antaŭensalton de la akvoutiliga

kaŝis la neeviteblan sorton de la dio de pesto. La karikaturito estas verkita de Fej Fukjuan, laboranto en la Ŝanhaja Fervojo-Administracio, en kies personaro sole en Ŝanhajo troviĝas 200-300 amatoraj pentristoj. Jam en la unuaj du tagoj de la "semajno por kontraŭi Usonon, liberigi Tajvan, kaj defendi la mondpakon" ili verkis pli ol 100 afiŝobildojn kaj karikaturojn kontraŭusonajn, montritajn sur muroj de la stacia domo. Ses el ili partoprenis la konkurson de poemoj, pentraĵoj kaj prozoj kaj verkis tuj en la konkursejo 15 karikaturojn.

Ĝoŭ Baŭlin, laboristo de Kioŭhin-ŝipkonstruejo, verkis artikolon titolitan *Rabia hundo neniam fariĝos ŝafo*. Tiu ĉi titolo trafe malkaŝas la proprecon de imperiismo. La deklamo de tiu ĉi artikolo ricevis aplaŭdon de la tuta aŭditorio. La raporta teatraĵo *La fino de la lupo kaj hundo*, la deklamo de *Pleniĝo je krimoj kaj proksimiĝo al morto*, *La muziko de anti-usona manifestacio*, ludita de la orkestro de naciaj muzikiloj, la mimiko *Kanonado al Ginmen* kaj aliaj prezentadoj, nome kantrakontoj, magiaj ludoj kaj kantoj kun gestoj ankaŭ ricevis entuziasmajn aplaŭdojn. Kaj la laboristoj kaj oficistoj ankaŭ esprimis, ke ili nepre pli vaste kaj pli profunde disvolvos la anti-usonan batalon kaj pli multe produktos por bati la usonan imperiismon, kiam ili revenos al siaj fabrikoj.



onstruado

konstruado. Post tutvintra batalado, brilaj sukcesoj estas jam akiritaj. Ekzemple en Anhuj-provinco pli ol 5,000,000 personoj partoprenas la akvoutiligan konstruadon, kaj estas konstruitaj nun en la tuta provinco jam 1,439 diversgrandaj kanaloj kun totala longeco de 6,500 kilometroj, pli ol 2,100 diversgrandaj advorezervejoj kaj pli ol 280,000 akvoutiligaj konstruaĵoj de digoj, kanaletoj kaj kluzpordoj. Tiuj konstruaĵoj povas konservi plie pli ol 3,300,000,000 kubometrojn da akvo, pliiĝi kaj plibinigi pli ol 1,026,000 hektarojn da irigacieblaj kampoj, preventi la tromalsekecon de ĉ. 350,000 hektaroj. En Guangdong-provinco oni jaf finis, ĉe la fino de lasta februaro, pli ol 200,000 diversgrandajn akvoutiligajn konstruaĵojn. El ili la nombro de advorezervejoj kun kapacito super 1,000,000 kubometroj da akvo superas



Kondukinte Akvon Sur-monten.

Ĉinstila pentraĵo de Jaŭ Joŭduo

270; kaj tiu de la irigaciaj konstruaĵoj, kun irigacia surfaco super 600 hektaroj atingas pli ol 150, kaj per tio pliiĝis kaj reboniĝis pli ol 666,000 hektaroj de irigacieblaj kampoj. En Fugian-provinco, oni en 4 monatoj finis pli ol 80,000 irigaciajn kaj kontraŭinundajn konstruaĵojn. Krome oni finis ankaŭ vastareaĵajn kontraŭ-tereroziajn laborojn kaj konstruon de 420-kilometra norma mardigo. Grandajn sukcesojn atingis ankaŭ la ceteraj provincoj.

La akvoutiligaj konstruadoj en la kuranta jaro superas tiun de iu ajn jaro pasinta ambaŭ en skalo kaj rapideco. Laŭ nekompleta statistiko ĝis la 10-a de februaro, komenciĝis pli ol 3,800,000 akvoutiligaj konstruaĵoj, inkluzive diversajn advorezervejojn, digojn de lagetoj, kanalojn, riveroretojn, putojn kaj

fontojn trovitajn. El ili finiĝis jam pli ol 3,100,000 konstruaĵoj. 13,300,000 hektaroj da kampoj fariĝis irigacieblaj kaj rebonigitaj. La tererozio sur 150,000 kvadrataj kilometroj estas fundamente haltigita. 20,000 milionoj de kubometroj de ter- kaj ŝtonlaboroj estas efektivigitaj. La nombro de grandaj kaj mezgrandaj ĉefaj konstruaĵoj des pli multe superas tiun en lasta jaro. La cifero de grandaj akvorezervejoj kun kapacito super 100,000,000 kubometroj da akvo atingas 270, t.e. trioble pli granda ol tiu en lastaj 10 jaroj ekde la fondiĝo de nia popola respubliko. Komencitaj mezgrandaj konstruaĵoj nombras pli ol 2,700, 60% pli multe ol tiu en la lastaj 10 jaroj. La 70 milionoj da heroaj ĉinaj popolanoj, per siaj propraj luktoj sur la akvoutiligaj konstruejoj, ankoraŭfoje pruvas, ke socialisma konstruado ne nur povas antaŭensalti ĉiujare, sed povos antaŭensalti eĉ pli bone kaj pli multeflanke jaron post jaro, ankoraŭfoje pruvas la pravecon de la Ĝenerala Linio de Socialisma Konstruado kaj la potencon de la popolkomunumoj.

Novaj karakterizoj

Kampanjon de akvoutiliga konstruado en la kuranta jaro karakterizas firma decidemo de la gvidaj instancoj, plena energio de la popolamaso, frua komenciĝo de la laboroj, plibonigiteco de la instrumentoj, altrapido kaj bona kvalito de la konstruoj. Ĝin karakterizas ankaŭ tio, ke intime kunlaboras kaj helpas ĉiuj koncernataj flankoj; ke sur la bazo de grandskala entrepreno de malgrandaj konstruaĵoj oni entreprenas ankaŭ multajn grandajn kaj mezgrandajn ĉefajn konstruaĵojn; ke oni atentis pri la formigo de kompletaj akvoutiligaj sistemoj per interligiĝo de grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj akvoutiligaj konstruaĵoj; kaj en kelkaj lokoj oni ankaŭ sukcesis utiligi la konstruaĵojn antaŭ ol ĝia finiĝo por pli frue ekspluati la utilon. Speciale rimarkinda estas tio, ke en ĉiuj lokoj komenciĝis grandskale la teknika renovigo kaj refremo de instrumentoj, kaj per tio ekleviĝas la bolanta kampanjo por alta efiko, alta normo kaj alta kvalito. Ĝeneraliĝas en transportado la ĉaroj, kapstanoj, brutaj kaj mekanikaj fortoj kaj simplaj mekanikaj, kaj en terfosado kaj ŝtonhakado—la progresaj metodoj, ekzemple laŭdirekta eksplodo, k. a. Ĉio ĉi tio multe altigas la


laborefikon, rapidigas la konstruadon, kaj donis tute novan fizionomion al la akvoutiligaj konstruejoj. Ekzemple en Henan-provinco la meza persona potaga terlaborkvanto de milionoj da konstruantoj altiĝis de 1,1 kubometroj en la komenco de lasta novembro ĝis la nuna 16 kubometroj. En Anhuj-provinco la meza taga laborefiko atingis 12 kubometrojn, t.e. unuoble pli ol tiu en decembro de lasta jaro. En laboroj de ĉefaj grandaj akvorezervejoj malaperis jam fundamente la peza korplaboro de vektportado. En la kanal-konstruado por konduki Taŭ-riveron surmonten en Gansu-provinco, ĉie disvolviĝas reformado de instrumentoj, kaj laŭlonge de la 600-kilometra konstruejo oni povas vidi ĉie progresajn transportilojn en la aero, sur la tero kaj akvo. El ili troviĝas lignaj vagonaroj, vinĉoj, altaj vindasoj, aŭtomataj ĉaroj, terglitujoj, kombajno por ŝarĝigo kaj deŝarĝigo, aŭtomataj grundfirmigiloj. Per enkonduko de tiuj instrumentoj, oni plene mekanikigas la laborojn de la kanalkonstruado, kaj kelkoble kaj kelkdekoble altiĝas la laborefiko.

La vastaj laborantamasoj en la akvoutiligaj konstruadoj ankaŭ plene disvolvas la memstaran spiriton. Ili multmaniere klopodas venki la malfacilojn de manko de materialoj kaj nesufiĉo de teknikaj fortoj, garantii efektive la kvaliton de la konstruaĵoj, malaltigi okulfrape la konstrukostojn kaj multe rapidigi la progreson de irigaciiga kampanjo. Formiĝas jam en multaj lokoj pli malpli kompletaj irigaciaj sistemoj. Tio kreas pli favorajn kondiĉojn por kontraŭbatali la naturajn katastrofojn de trosekeco kaj inundo kaj garantii riĉan agrikulturan rikolton en la kuranta jaro.

Ankoraŭ antaŭen

“Akvoutiligado estas la vivfonto de agrikulturo”. Jen estas trafa konkludo de Prezidanto Maŭ Zedong

Streĉa Batalo ĉe la Draka Pordo Kolektive pentrita de Ŝandong-a Arta Instituto



resuminta la agrikulturan historion de Ĉinio dum jarmiloj. Tiun eterne validan veron pli riĉigis la agrikultura disvolviĝo. Depost la fondiĝo de nia popola respubliko. La faktoj en la lastaj dek jaroj pruvas, ke en Ĉinio, kun teritorio tiel vasta kaj naturaj kondiĉoj tiel diversaj, se la akvoutiliga konstruado ne estus bone plenumita, milionoj da hektaroj estus minacataj ĉiujare de diversgradaj naturaj katastrofoj kiel inundo kaj trosekeco, kaj tio malhelpas konstantan kreskadon de agrikultura produktado, kaj donas malfavoran influon al la nacia ekonomio kaj sekureco de la popolanoj, kvankam nia akvoutiligado por agrikulturo akiris jam senprecedencan atingon. Por garantii la agrikulturan produktadon, kaj daŭran antaŭensaltegon de la tuta nacia ekonomio, la ĉina popolo devas ankoraŭ marŝi antaŭen, devas ĝisfunde venki la naturajn katastrofojn—trosekecon kaj inundon, por liberigi la agrikulturon de la naturaj ka-

tenoj. Tial la Popola Registaro proklamis: “Akvo-utiligado estas ankoraŭ la fundamenta problemo por disvolvi agrikulturan produktadon en nuntempo. Lanĉu en kelkaj venontaj vintroj kaj printempoj ankoraŭ kelkajn alttajdojn por akvoutiliga konstruado, por efektiviĝi la akvoutiligadon laŭeble en kompare mallonga tempo. Tio estas unu grava tutpartia kaj tutpopola tasko por nia socialisma konstruado.” Ni kredas, ke sub la gvido de la Partio kaj la prilumo de la Ĝenerala Linio de Socialisma Konstruado, la antaŭensaltego kaj popolkomunumo, la ĉina popolo ne nur povos plenumi tiun gloran taskon kun memfido, sed eĉ povos alpreni la iniciativon el la manoj de la naturo, ke la homaro estu mastro de la naturo anstataŭ ĝia sklavo, ke la tero estu bone aranĝita, la riveroj estu jugataj, la akvoj estu efike utiligataj kaj la lando estu konstruata pli feliĉa, pli bela.

Lin Ming:

Kresko de Ŝparajoj—Pliboniĝo de la Vivo

La pliboniĝo de vivstato de la ĉina popolo kaj la rapida altiĝo de ilia aĉetpovo montriĝis el la rapida kresko de mondeponoj. Precipe en la urboj, la kresko de mondeponoj klare montras la altiĝon de aĉeta povo de laboristoj kaj oficistoj.

La kresko de ŝparajoj en la urboj elmontras ke la vivnivelo de laboristoj kaj oficistoj multe altiĝis. Je la fino de 1949, mondeponoj en urboj sumiĝis ne pli ol 10,070,000 juanojn, sed je la fino de 1952, la sumo atingis 840,070,000 juanojn. Je la fino de la Unua Kvinjara Plano en 1957, ili pliiĝis ĝis 2,740,070,000 juanoj. La sumo de mondeponoj plue pliiĝis ĝis 4,720,000,000 juanoj en 1959, kiel rezulto de la senĉese antaŭensaltego en nacia ekonomio, post la propono de la Ĝenerala Linio de la Partio, “streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por multe, rapide, bone kaj ŝpare konstrui socialismon.”

Estas granda sukceso ke la popola mondepono atingis tiun ĉi ciferon. Se la registaro investus la sumon en fundamentan konstruon, ĝi povus konstrui dekdu modernajn fabrikojn de fero kaj ŝtalo, po jara produkto de 1,000,000 tunoj, aŭ aĉeti 230,000 54-ĉevalpovajn traktorojn.

Dum la pasintaj dek jaroj, estis rapida kresko de mondeponoj. Precipe inter 1958 kaj 1959, estis pliigo de 2,000,000,000 juanoj, kio pravigas la diron ke “la laboro de unu tago nun egalas tiun de dudek jaroj en

la pasinteco.” Akra kontrasto estas inter kondiĉoj de nuntempo kaj en la malnova reĝimo. Dum la 30 jaroj de ŝparbanka afero inter 1906 kaj 1936, la tuta sumo de mondeponoj estis 416,000,000 juanoj. Antaŭe, sub la subpremado de imperiismo, burokratkapitalismo, feŭdalismo, la popolo vivis en sufero kaj mizero, sed nun sub la gvidado de la Komunista Partio kaj la Popola Registaro, la vivnivelo de la laboranta popolo en nova Ĉinio plialtiĝas rapidege.

Kial estas tia rapida kresko de ŝparajoj en la urboj?

La ĉefa kaŭzo estas sendube en la plimultiĝo de okupon-havantoj. Aperis nova situacio, en kiu ĉiu havas okupon, regulan enspezon kaj nature, ŝparajojn. Dum la pasintaj dek jaroj, la nombro de oficistoj kaj laboristoj kreskis pli ol kvaroble, de 8,000,000 en 1949 ĝis 45,320,000 en 1958. En malnova Ĉinio, senlaboreco estis tiel serioza, ke en ĵurnaloj ofte troviĝis tiaj esprimoj kiel “pli da personoj ol bezonataj”, “diplomiiĝo signifas senokupon,” ktp. Estis filmo nomata “Mizera sorto de studentoj”, kiu bildigis kiel iu talenta studento suferis ĉagrenon de senlaboreco post kiam li estis diplomita. Estis pli ol 4,000,000 senlaboruloj en la urboj ĉe la Liberigo en 1949. La Partio kaj la registaro, zorgemaj pri la situacio, tuj komencis solvi la problemon. En 1952, post la periodo de restatiĝo de nacia ekonomio, duono de la senlaboruloj havis laboron, kaj dum la Unua Kvinjara Plano, la pro-

blemo de senlaboreco estis fundamente solvita. Senlaboreco tute malaperis sekve de la antaŭensaltego en industria kaj agrikultura produktado kaj la apero de la popolaj komunumoj. Ĉiu kiu volas labori havas okupon. La granda nombro de laborantaj homoj favoris la rapidan kreskon de mondeponoj en urboj. En 1949, estis nur 400,000 deponantoj, sed en 1952 ili multiĝis ĝis 6,550,000, kaj ĉe la fino de 1958, atingis 35,000,000. Nun la plejmulto el la urbanoj havas jam mondeponojn. En Hejlonggiang-provinco, pli ol 80 procentoj de la laboristoj kaj oficistoj havas mondeponojn, kun meznumero de pli ol 100 juanoj po deponanto.

La rapida kresko de ŝparaĵoj en urboj ankaŭ spegulas la senĉesan pliigon de salajro. En la pasintaj dek jaroj, favoraj redifiniĝoj de salajro ja estis rapidaj. Ekzemple, inter 1950 kaj 1952, estis ĝenerala pliigo de 70 procentoj, kaj de 1953 ĝis 1957, estiĝis alia pliigo de 42.8 procentoj. Plua pliigo de salajro efektiviĝis dum la antaŭensaltego en 1958 kaj 1959. Krom la salajroaltigo por la ĉinaj laboristoj kaj oficistoj, estas multaj bonstataj servoj. Antaŭ la Liberiĝo, ĉiam regis la timo de senlaboreco kaj zorgo pri tro multaj infanoj, maljuneco, morto, gravaj vundoj aŭ fizika senkapableco. Nun efektiviĝis labora asekuro por fabrikaj laboristoj, senpaga medicina zorgo kaj speciala subvencio kontraŭ urĝa bezono por laborantoj en registaraj oficejoj, edukaj institucioj kaj kulturaj organizadoj. La sumo elspezita en tiuj bonstataj servoj de 1952 ĝis 1958 estis 14,100,000,000 juanoj. Dum la sama periodo, stipendio por studentoj sumiĝis je 1,800,000,000 juanoj. La ŝtato elspezis, de 1952 ĝis 1958, 6,300,000,000 juanojn en domkonstruado por laboristoj meznombre po ses kvadratmetroj de loĝspaco je 290 juanoj.

La Fondiĝo de la Popola Komunumo Akcelis la Kreskon de Ŝparaĵoj en la Kamparo

La popola mondeponado ne nur rapide disvolviĝas en urboj sed ankaŭ en vilaĝoj.

Bankdeponoj de la popolaj komunumoj, inkluzive deponojn de la produktaj brigadoj kaj la ŝparaĵojn de



Kampaninoj de la sanŝilipu-a popolkomunumo de Ĝin-gubernio, Liaŝning-provinco estas frekventantoj al la monŝpara servo. *Foto de Vang Fumin*

kampanoj, pliĝis de 11,000,000 juanoj en 1953 ĝis 179,000,000 en 1956. En 1957, ili atingis 260,000,000, kaj superis 400,000,000 juanojn en 1959. En novembro de 1959, la deponoj de membroj de la popolaj komunumoj en Hejlonggiang-provinco sumiĝis 99,300,000 juanojn, meznombre po naŭ juanoj por ĉiu ano en la vilaĝoj. La meza nombro de mondepono de la kampanoj en Ŝanhi-provinco estas 8.9 juanoj por ĉiu persono.

La senĉesa kaj rapida pliigo de mondeponoj en nova Ĉinio montras ne nur la grandan ŝanĝon en popola ekonomia vivo, sed ankaŭ ŝanĝon en la karaktero de mondeponoj kaj novajn rilatojn inter la popolo kaj la registaro.

Mondeponado fariĝis rimedo por helpi al la popolo aranĝi sian porvivan elspezadon laŭ bona plano, kaj altigi pogrado la vivnivelon. En la decidoj de la Oka Plena Sesio de la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio estis montrita, ke la popolo devas scii ne nur kiel bone organizi sian laboron, sed ankaŭ kiel pli racie aranĝi sian vivon. Oni devas vivi laŭ sia enspezo, fari ĉiujn necesajn kalkulojn kaj prepari por la estonteco. Estis ankaŭ montrita, ke kiel estas grave pliigi produkton, tiel same estas necese praktiki ekonomion: ĉu en nacia konstruado, organizado de popola komunumo, administrado de ĉiu ajn entrepreno, ĉu en dommastrumado. Tio estas la vojo al prospero kaj potenco de la patrolando. Tial, la graveco de mondeponado estas ja evidenta. Ĝi turnis ĉiun portempan neuzatan monon de privataj individuoj en utilan kapitalon por nacia konstruado, kio signifas profiton por la lando kaj por la individuo. La popolo komprenas el sia propra sperto, ke partopreno en mondepono post pliigo de la enspezo ebligas akumuli mal-

grandajn sumojn por granda afero, por plue kontentigi la vivbezonojn. Sekve, la registaraj oficejoj, industriaj kaj komercaj entreprenoj kaj popolaj komunumoj ĉiuj kuraĝigas la aferon de mondeponado. La Artikolo 11 de la Konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko, "La ŝtato protektas la rajton de civitanoj posedi leĝe gajnitan enspezon, ŝparaĵojn, domojn kaj aliajn rimedojn de vivo." La Popola Banko efektivas la principojn de "mondepono laŭ libera volo, depreno sen iu ajn limigo, kaj garantio de la sekreteco de deponoj." La Banko ankaŭ faras diversajn servojn al la deponantoj. Por la oportuneco de la deponantoj,

ĝiaj branĉoj kaj agentejoj de mondeponoj establiĝis ĉie en urboj kaj vilaĝoj. En urboj, estas nun ĉirkaŭ 10,000 mondeponaj branĉoj de la Popola Banko kaj 100,000 agentejoj aŭ servejoj funkciataj de la popolo mem, kun koncerna personaro de 350,000 ĝis 400,000 anoj. En vilaĝoj, estas 200,000 kreditaj branĉoj kaj 770,000 servejoj, kun totala nombro de 1,900,000 kunlaborantoj por mondepona afero. Hodiaŭ, la afero de mondeponoj estas plenumata ne nur de bankoj, sed ankaŭ helpe de registaraj oficejoj, diversaj entreprenoj, popolaj komunumoj kaj vasta amaso de la popolo.

Zong Ven :

Hazardludejo Transformiĝis en Kulturalan Centron

Antaŭ dek jaroj, ĉiuj sciis ke en la centro de Ŝanhajo troviĝas ĉevalvetkurejo. Ĝi estis granda hazardludejo, kiun starigis aventuristoj, kanajle utiligante la imperiismajn privilegiojn por trompe pirabi Ŝanhaj-anojn sub la ŝildo de ĉevalvetkurado. Oni ankoraŭ memoras la horloĝan turon en ĝia nordokcidenta angulo. La domo sub tiu turo estis destinita por lotado de konkurso. La "lotado" estis simpla trompa artifikajo. Antaŭ la ĉevalvetkurado aperis en ĵurnaloj grandliteraj anoncoj kun rubrikoj: "La granda printempa ĉevalkonkurso, ĉampiona premio x x mil juanoj". La anonco tromplogis multajn Ŝanhaj-anojn riski sian monon sur la veto. Ili ne komprenas, ke la direktoroj de la ĉevalvetkurejo neniam kontentiĝas nur je la 30 procentoj el la sumo de disvenditaj loteriaj biletoj. En la antaŭtago de lotado, ili ĉiam faris artifikojn en la lotĉambro, malsekigante la globetojn kiujn ili ne deziris elfali el la lotujo, por ke nur la de ili dezirataj numeroj elruliĝu. Plue, la numeroj de la ĉevaloj estis ŝanĝeblaj laŭ ilia volo, kaj

ankoraŭ pli multaj komplotoj estis farataj, krome, kun la jokeoj. Kun la ruliĝo de lotglobetoj, disreviĝis la trompitaj vetintoj, sed la aventuristoj ridis kaŝe pro siaj sukcesoj. Tie tute ne estis honesta loterio, sed sensangmakula buĉejo. Antaŭ la Liberiĝo, ofte okazis sinmortigoj per falego de alta etaĝo, sindronigo en Huangpu-riveron, aŭ mempendigo pro bankroto kaŭzita de perdoj en ĉevalkonkursaj vetado.

La ĉevalkurejo ne servis nur kiel hazardludejo, sed ankaŭ kiel kazerno kaj bufedo por fremdaj soldatoj, skotlandaj soldatoj de Britio, mikadaj armeanoj de Japanio kaj marsoldatoj de Usono ĉiuj impertinentis tie kaj faris multajn ĝenojn kaj malutilojn al la loka popolo.

Kiel fieraj kaj arogantaj estis la aventuristoj kaj imperiistoj en tiuj tagoj de granda humiliĝo de Ĉinio! Sed, en malpli ol duonjarcento, ĉio ĉi tio forpasis kiel inkubo.

En la 28a de majo, 1949, Ŝanhajo estis liberigita, kaj tiam la

ĉina popolo ne povis plu toleri tian putran "privilegiitan teron", speciale rezervitan por la imperiistoj, en sia bela lando. Tial, je la unuanima postulo de la popolo, la Ŝanhaja Popola Registaro reprenis la ĉevalvetkurejon en julio, 1951, kaj ĝin transformis en popolan parkon. Oni vidis fizionomion de la aventuristoj en ilia lasta tago; ili feroce mortigis la plej bonajn ĉevalojn antaŭ ol ili forlasis la vetkurejon.

Nun la ĉina popolo uzis tiujn ĉi konstruaĵojn laŭ sia propra deziro. Sur la 38 metrojn alta flagstango flirtas ne plu la fremda flago, sed nia plej amata kvinstela ruĝa flago. La domo por lotado fariĝis la tutlande konata Ŝanhaja Muzeo. Apud la muzeo estas biblioteko kaj sportpalaco, kiuj akceptis jam sennombrajn legantojn kaj atletajn amatorojn. Eĉ hodiaŭ, ankoraŭ freŝas la impreso pri la inaŭguro de la biblioteko en julio, 1952. Kiom fervoris pri ĝi la popolo! Ili deziregis ĝin viziti eĉ nur por ekrigardi. Dum la unuaj tri tagoj, pli ol dek mil Ŝanhajaj loĝantoj vizitis la bibliotekon ĉiutage. Nun, ĝi estas tuttage plena de laboristoj, studentoj k.a., kiuj alvenas tien, sidiĝas kaj silente studas, kun granda soifo al scioj kaj alta respondeco por pli bone konstrui socialismon en la patrolando. La sportpalaco ankaŭ fariĝis bazo por disvastigo de novaj sportoj, kaj multaj amatoraj atletoj kulturiĝis tie. La famaj ĉinaj tablotenis-ludantoj



La Popola Parko de Ŝanhajo

Foto de Giang Kiŝeng

Ŝju Jin-sen kaj Jang Rui-hua ja debutis ĝuste el tiu ĉi atleta centro. La antaŭaj privataj staloj fariĝis nun fruktovendejoj kaj vestbutikoj. Kie staris la granda stalo de la antaŭa "Ĵokea Klubo", nun staras la Centra Hospitalo de Sinĉeng-distrikto. Ĉio tie estas brile nova, pura kaj neta, kaj nenia spuro de la malnova mizero estas trovebla.

Ĉiuj tiuj ĉi ŝanĝoj estas ne imageblaj al tiuj, kiuj ne vidis ilin propraokule. La plej granda ŝanĝo estas tamen de la kur-grundo mem. En la norda parto de la origina ĉevalkurejo kun areo de pli ol 500 muoj, nun estas parko kun buntaj florbedoj kaj en la suda parto granda majesta placo kun larĝaj pavimitaj vojoj. Ĉe la antaŭa startejo de ĉevalkuro, nun fluas klara ondanta rivereto. En la pasinteco, staris tie du feraj stangoj kun reto pendita sur ili. Je la signalo de starto per eksvingo de ruĝa flageto, pli ol dek ĉevaloj elpafiĝis kiel kugloj. Tuj la homamasoj muĝis freneze, kaj fine, krioj miksiĝis kun veoj de malespero, ĉar perdita estas la veto. . . . Fakte, la ĉevalkonkurso en tiuj tagoj estis nur trompajo de la aventuristoj. La unua kaj dua gajnantoj estis ĉiam sekrete difinitaj antaŭ la vetkurado. Kiel oni povus eviti

perdon? Nun, restas nur la du feraj stangoj starantaj en la mezo de la rivereto, sed tre malmultaj vizitantoj scias jam pri ilia deveno, la konstruo de la popola parko kun areo de pli ol 200 muoj, komenciĝis de 1952. Oni ne povas forgesi la entuziasmon, kun kiu la Ŝanhaj-anoj rapidigis la konstruadon de la parko. "Planti arbojn dum varmegaj somertagoj, kaj fosi kanalon dum pluva sezono." Jen tiel la ĝardenistoj rompis tradiciajn regulojn por rapidigi la laboron. En la unua tago kiam la parko malfermiĝis al la publiko, alsvarmis pli ol 400,000 vizitantoj. Ordinare, teatroj aŭ kinejoj anoncas sin "plene okupita", sed la samo okazis, kiam la parko havis Ekspozicion de Krizantemoj en 1954. La popolo amas sian propran parkon. Iu sesdekelkjara maljunulo ĉiam portas tranĉileton kun si kaj helpas la ĝardenistojn flegi la florarbojn ĉiutage ekde la inaŭguro de la parko. Lernantoj de element- kaj mez-lernejoj formis grupojn de flegado kaj protektado, kontribuante multe al la laboro de la parko. Antaŭe, oni konsideris nebla kreskigo de pomarboj en Ŝanhajo, sed nun ili ne nur kreskas sed eĉ fruktas. En la printempa festo (novjaro laŭ ĉina luna kalendaro) lastajare, la ĝardenistoj aranĝis "ekspozici-

cion de samtempa florado de cent floroj", florigante florojn el diversaj sezonoj samtempe. En la infana ludejo, ĉiam sonoras ridoj de infanoj, ludantaj ĝoje sur glitiloj, balanciloj, ktp. La naĝbaseno altiras amase junulojn kaj junulinojn vigle montrantaj sian lertecon en naĝado. Kaj la manĝejoj kaj kafejoj estas ĉiam plenaj de klientoj. Kaj amatoraj pentristoj kaj fotografistoj trovas tie interesajn subjektojn.

La placo estas granda kaj majesta. Kaj la vojoj estas tute pavimitaj per granito. Dudek kvar altaj lampkolonoj pentritaj laktoblanke, staras tie formante sistemon de ilumino, kun po kvar elektraĵoj en formo de ĉinaj lanternoj, pendantaj supre, kiuj brilas lume en la nokto. Precipe, ĉiujare en la Unua-Maja Laborfestoj kaj la Nacia Festoj en la unua de oktobro, la granda parado de kelkcent mil popoloj, kiuj pasas tra la placo, alte tenante tabulojn kun okulfrapaj grafikajoj kaj tabelojn de produktoj kaj antaŭensaltajn celindikojn, kaj modelojn de produktaĵojn, por raportoj siajn atingojn al la Partio kaj la registaro, bolante kvazaŭ ondanta maro.

En la noktoj de festtagoj, multkoloraj fajraĵoj brilas sur la ĉielo, lumigante la tutan placon, dum la popolo ĝojege dancas kaj kantas. En ordinaraĵoj, frue en mateniĝo jam bruas sur la placo sportemuloj, komencas tie sian ĉiutagan ekzercadon: longdistanca kurado, kurego, futbalo, ĉina luktarto, kalisteniko ktp. ktp. Inter ili troviĝas ankaŭ infanoj sub dek jaroj kaj blankharaj maljunuloj kaj maljunulinoj. Kaj sur la vojo tra la placo, transportveturiloj rapidas tage kaj nokte, elspirante spiriton de paca laborado.

Nu, kiel granda ŝanĝo estas la transformo de la hazardludejo en kulturan centron! Tio reflektas la venkon kaj sukceson de la ĉina popolo!

La Kultura Disvolviĝo de Ĉinaj Nacimalplimulto

ĈINIO estas unueca kaj multnacia lando, en kiu troviĝas, krom la hanoj, kiuj formas 94% de la tuta nacio, ankaŭ la mongoloj, hujoj, tibetanoj, ujguroj, ĝuangoj, mjaŭoj, jioj, bujioj koreoj, manĉuoj k.a., entute pli ol 50 naciaj malplimulto, kun pli ol 35 milionoj da popolanoj (laŭ statistiko de 1953) formante la restajn 6% de la tuta loĝantaro. Tiuj naciaj malplimulto, same kiel la hanoj, estas laboremaj, bravaj kaj intelektaj popoloj. Dum longaj generacioj, kune kun la hanoj, ili kreis per sia diligenta laborado la historion kaj kulturon de nia lando, doninte gloran kontribuon al la formiĝo de la granda patrio.

Sed, antaŭ la Liberiĝo, ĉiuj popoloj de nia lando vivis treege mizere, sub la reakcia regado de fremdlanda imperiismo kaj enlandaj feŭdismo kaj burokratkapitalismo, kaj troviĝis en postrestinteco, ekonomie kaj kulture, kaj la nacimalplimulto restis eĉ en ankoraŭ pli malalta nivelo, kompare kun la hanoj. En multaj nacimalplimultaj regionoj tute ne ekzistis modernaj lernejoj kaj pli ol 95% de la nacimalplimultaj popolanoj estis analfabetoj. Multaj nacioj ne havis skriban lingvon, kaj primitive gravuris lignon aŭ faris nodojn sur ŝnuro por rememorigi aferojn. Tre malbonaj estis la higienaj kaj kuracaj kondiĉoj, kaj longdaŭraj suferadoj de diversaj malsanoj alportis al ili senlimajn katastrofojn. La malkreskado de loĝantaro serioze minacis la ekziston kaj daŭriĝon de iuj nacimalplimulto.


La venko de nia revolucio kaj fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko donis novan vivon al la diversaj nacioj de nia lando. De dek jaroj, la diversaj nacioj en nia lando praktikas la politikon de egaleco kaj unuiĝo en solvado de naciaj problemoj sub la gvido de la Ĉina Komunista Partio kaj prezidanto Maŭ

Zedong. Dum la aktiva helpado por realigi la aŭtonomion de nacimalplimultaj regionoj la naciaj malplimulto estas samtempe aktive helpataj efektiviĝi la sociajn reformojn kaj disvolvi la konstruadon de la ekonomio kaj kulturo. Nun estas plejparte plenumitaj la laboroj de starigo de aŭtonomaj lokoj kaj aŭtonomaj reginstancoj. En pli ol 95% de la regionoj de nacimalplimulto plenumiĝis la demokratia kaj socialisma reformadoj, kaj plejparte efektiviĝis la popolkomunismo. Multe disvolviĝis la konstruado de ekonomio kaj kulturo en tiuj regionoj kaj okulfrape leviĝis la vivo de la popoloj. Senprecedence firmiĝis kaj disvolviĝis la socialismaj naciaj interrilatoj de egaleco, unuiĝo, interhelpo, kunlaboro, frateco kaj kuna disvolviĝo inter la diversaj nacioj de nia lando.

De 1958 komenciĝis nova, grandioza periodo historia de ĉiufanka kaj daŭra antaŭensaltegado en konstruado de socialismaj ekonomio kaj kulturo por niaj diversnaciaj popoloj, sub la direktado de la Ĝenerala Linio de la Ĉina Komunista Partio streĉi plene la energion kaj strebi ĉiam supren por konstrui

En la Nordokcidenta Akademio de Nacioj en Langŝou studas 2200 gestudentoj el 17 nacioj.

Foto de Giang Kiŝeng



socialismon, multe, rapide, bone kaj ŝpare. Antaŭe en 1949 ĉe fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, prezidanto Maŭ Zedong jam diris, ke "sekve de la alveno de la alta tajdo de ekonomia konstruado, neeviteble aperos alta tajdo de kultura konstruado." Nun la aktuala stato, ĉu en la regionoj de la hanoj, ĉu en tiuj de nacimalplimulto, plene pruvas la ĝustecon de tiu aserto de prezidanto Maŭ. Ĉiam pli disvolviĝas kaj prosperas la novaj socialismaj kulturoj de la diversaj nacioj.

Fluga antaŭensalto de Edukaj kaj Sciencaj Aferoj

Dum dek jaroj granda kvanto da diverstipaj kaj diversgradaj lernejoj estis establitaj en la regionoj de nacimalplimulto, de nia registaro sub la gvido de la Ĉina Komunista Partio. Fondiĝis en tiuj aŭtonomaj lokoj ne nur grandkvante elementaj kaj mezgradaj lernejoj, en multaj tiuj lokoj eĉ altaj lernejoj, kaj en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, Guanghi-a Ĝuanga

Tibetaj knabinoj de Aba, Siĉuanprovinco ankaŭ scipovas legi.

Foto de Ĝang Ĉihjue



Aŭtonoma Regiono, Ninghia-a Huja Aŭtonoma Regiono kaj multaj aŭtonomaj ĝouoj* stariĝis tutaj sistemoj de edukado, komencante de elementaj, mezgradaj ĝis altaj lernejoj. En la nuna momento, la elementa edukado estas jam ĝeneraligita en plej multaj nacimalplimultaj regionoj kaj en unuopaj tiaj lokoj, estas ĝeneraligita eĉ la mezgrada edukado. Ege plimultiĝis la nombro de lernantoj de nacimalplimulto, kompare kun la tempo antaŭ la Liberiĝo. La statistiko de la unua duonjaro de 1959 montris, ke estas, sume, pli ol 4,000,000 elementaj lernejoj, 390,000 gimnazianoj kaj 22,000 studentoj de naciaj malplimulto. Kompare kun la plej prospera jaro antaŭ la Liberiĝo, la elementaj lernejoj kreskis en nombro je pli ol okoblo, la gimnazianoj je centdekoblo kaj la studentoj je tridekkvoblo. Plene disvolviĝis ankaŭ la movadoj de likvido de analfabeteco kaj postlabora klerigado, kun senprecedencaj atingoj. Ĝisfunde suferinte la malfeliĉon de senklereco en la malnova socio, la nacimalplimultaj popoloj des pli forte postulas la kulturalan emancipon tuj post la Liberiĝo. Ili diras: "Socialismo estas paradizo, sed fermita al homoj sen kulturo." Tial ili sindediĉis al la nomitaj movadoj kun ĉielatinga energio revolucia, kaj en ne malmultaj aŭtonomaj lokoj nacimalplimultaj jam plejparte likvidiĝis la analfabeteco inter junaj kaj maturaj homoj. Ekzemple, en Guanghi-a Ĝuanga Aŭtonoma Regiono forskuis la analfabetecon pli ol 3,000,000 homoj sole en la jaro 1958, kaj en la komenco de 1960 denove pli ol 3,600,000 homoj, partoprenis lernadon de legscio aŭ en diversaj postlaboraj lernejoj. La vasta disvolviĝo de kontraŭ-analfabetea movado liberigis milionojn da nacimalplimultaj popolanoj de analfabeteco, ke ili fariĝis mem mastroj de kulturo.

La sciencesploraj laboroj ankaŭ rapide disvolviĝas en nacimalplimultaj regionoj, komenciĝante de nenio. En plejparto de aŭtonomaj lokoj stariĝis diversaj sciencaj institucioj kaj bazaj organizaĵoj de la Asocio por Popularigo de Sciencaj kaj Teknikaj Scioj. Ekzemple, en Janbian-a Korea Aŭtonoma Ĝou-o de Gilin-provinco establiĝis 8 institutoj kaj 116 stacioj de sciencesplorado kaj tekniko, kun pli ol 700 laborantoj, el kiuj multaj estas laboristoj kaj kamparanoj. Krome establiĝis 7 guberniaj kaj urbaj Asocioj por Popularigo de Sciencaj kaj Teknikaj Scioj kaj 210 bazaj organizaĵoj de tiuj asocioj en fabrikoj, minejoj kaj popolaj komunumoj, kun sume 16,921 membroj. La vasta laboristaj kaj kamparanaj amasoj partoprenis aktive la sciencesplorajn laborojn kaj montris sian grandan intelekton kaj talenton, senĉese kontribuante per kreadoj, inventoj kaj teknikaj renovigoj, kiuj nombriĝis 1580 sole dum la amasa movado de invento kaj kreado en 1958. Kun la progresado de la edukaj kaj sciencaj aferoj, la armeo de nacimalplimultaj inteligentuloj rapide vastiĝas kaj fortiĝas. Laŭ nekompleta statistiko de 1959, jam nom-

brigiĝis pli ol 300,000 nacimalplimultaj inteligentuloj, inkluzive sciencteknikajn laborantojn, diversgradajn instruistojn, literaturistojn, artistojn, ĵurnalistojn kaj laborantojn de eldonaj aferoj.

Florado de Literaturo kaj Artoj

Sub la direktoj de la Ĉina Komunista Partio la literaturo kaj artoj "en servado al la politiko de proletaro, al la produktado kaj al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj" kaj "samtempa disvolviĝo de cent floroj kaj konkura sinnesprimado de cent skoloj", senprecedencan disvolviĝon kaj prosperon ekhavas la literaturo kaj artoj de la nacimalplimultoj, plibeligante la buntan ĝardenon de literaturo kaj artoj de la patrolando.

Niaj nacimalplimultoj estas famaj pro sia lerteco kaj talento de kantado kaj dancado, kun longaj historiaj tradicioj. Kaj nun ankoraŭ pli kolorriĉan fizionomion ekhavas iliaj artoj de kantado, dancado kaj teatraĵo. Laŭ statistiko, ĝis la fino de 1958 estis sume 413 ensembloj (trupoj) teatraj kaj kantdancaj de nacimalplimultoj, inter kiuj la Ĉina Nacia Ensemblo estas la plej granda, kun karaktero tutlanda. La florado de la artoj de kantado, dancado kaj teatraĵo de la naciaj malplimultoj tre multe pliriĉigis la kulturan kaj artan ĝardenon de la patrio kaj disradias originalajn brilojn sur internacia arta scenejo.

Ŝi Meijing, dong-nacia knabino, fervore helpas sian patrinon lerni legi kaj skribi kiel miloj kaj miloj da aliaj faras.

Foto de Vang Ginan



Tabulsalto — ŝatata sporto de koreinoj en Janbiana Aŭtonoma Subprovinco.

Foto de Li Gilu

Ekzemple, *La plado-danco* de uĝuroj, *La Ordos-danco* de mongoloj, *La pavo-danco* de tajoj, la korea *Kanto de Fraŭlino* kaj la ĵia kanto *Restu Vi, Malproksima Gasto* kaj multaj aliaj elitaj programeroj ricevis premion en konkursoj de literaturo kaj artoj de la Paca kaj Amikeca Festivalo de Tutmondaj Junuloj kaj Studentoj.

Multaj antaŭe ignoritaj popolaj literaturajoj de nacimalplimultoj estas elfositaj kaj redaktitaj post la Liberiĝo, kaj brilas mirinde, ekzemple, la mongola *Gada Meren*, la ĵiaj epopeoj *Aŝma* kaj *La Kanto de Aŝioj*. k. a. Kaj samtempe aperis ankaŭ multaj elitaj literaturajoj modernaj, spegulantaj la vivon kaj lukton de diversaj nacioj, kiaj romano de mongola verkisto Ulanbagan *Militfajro sur Stepo*, novelaro de uĝura verkisto Zunun Hadr *Forĝado*, romano de ĵia verkisto Li Kiau *La ridanta Ĝinŝa-rivero*, poemaro de taja poeto Hanan Zaoj *Rigardante al Pekino el Arbaro*, k.a., ĉiuj tre ŝatataj de la amasoj. Precipe, de la antaŭensaltego de 1958, la vastaj popolamasoj de nacimalplimultoj partoprenis literaturan kaj artan kreadon kun senprecedenca fervorego, kaj la literaturo kaj artoj fariĝis propraj aferoj de la popolamasoj. Ekzemple, en 1958 dum la grandioza kampanjo de ekspozado de popolaj kantoj, pli ol dek milionoj da popolkantoj estis kolektitaj kaj verkitaj en tre mallonga tempo, ke vere "kantas miloj, kunkantas dekmiloj, ĉie sonas popolkantoj sur la montoj kaj sur la kampoj", iu konstatis ne troige, ke la nacimalplimultaj regionoj fariĝis oceano de poemoj kaj kantoj. Kun la disvolviĝo



Lernas legi kaj skribi infanoj de Lahu-nacio en Junnan-provinco.

Foto de Maj Huanvej

de literaturo kaj artoj elkreskas multope verkistoj, poetoj kaj artistoj nacimalplimultaj, el kiuj centoj estas akceptitaj kiel membroj de la Ligo de Ĉinaj Verkistoj aŭ la Ligo de Ĉinaj Muzikistoj, aŭ ties lokaj filioj.

Elvolviĝo de la Lingvoj kaj skriboj de Naciaj Malplimultoj

La disvolviĝo de la lingvo kaj skribo havas tre gravan signifon por disvolvi la politikon, la ekonomion kaj kulturon de la nacimalplimultoj. La Ĉina Komunista Partio kaj la centra registaro de nia lando donas grandan atenton al tiu problemoj jam de la komenco. La Konstitucio de nia lando difinis: "Ĉiuj nacioj havas la liberon uzi kaj disvolvi siajn lingvojn kaj skribon." Antaŭe en 1951 la Partio kaj la registaro jam elmetis, kiel gravan kulturen taskon, la laboron "helpi en kreado de skriba lingvo al tiuj nacioj, kiuj tian ne posedas, kaj helpi en kompletigado de skriba lingvo al tiuj, kies skriba lingvo ne estas kompleta."

La kreado kaj reformado de skribaj lingvoj de nacimalplimultoj en nia lando estas farata sur la bazo de latina alfabeto, kaj la sistemoj estas kiel eble plej akordigataj al tiu de la fonetika alfabeto de la hanlingvo. Laŭ tiu principo, la Partio kaj la registaro jam helpis al pli ol dek nacimalplimultoj krei sian skriban lingvon en lastaj kelkaj jaroj, inter kiuj estas la ĝuango, bujio, mjaŭo, jio, dungo, hanio, lisuo, kavao, lio, naŝio kaj aliaj, kaj ellabori reformajn projektojn de la skribaj lingvoj de la ujuguro, kazaĥo, taĵo,

lahuo, kaj ĝingpoo. Tiuj skribaj lingvoj, iuj en disvastigado kaj aliaj en prova uzigado, ĝuas varman subtenon kaj akcepton ĉe la vastaj popoloj de la koncernataj nacioj. Ekzemple, la ĝuang-nacio estas la plej multnombra el niaj nacimalplimultoj. Ĝi ne havis sian propran skriban lingvon antaŭ la Liberiĝo. Post la registaro helpis ĝin krei kaj disvastigi la skriban lingvon, ke multaj laborantaj popoloj forskuis sian analfabetecon en tre mallonga tempo, kaj pro tio elkore bonvenigas la novan skriban lingvon. Antaŭe, ĉe iuj nacimalplimultoj, skriban lingvon ne pose-

asantaj, oni ofte ne povis trovi kontiston por librotendi en agrikulturaj kooperativoj, ke dum notado de laborpoentoj devis esti utiligataj fabgrajnoj kiel kalkulilo, rezultigante konfuzajn kaj malfacilajn en distribuado de rikoltoj. Post la kreo kaj disvastigo de skriblingvo, la situacio tuj ŝanĝiĝis. Dank' al la nove kreita skriba lingvo, ili ekkapablis legi kaj skribi, kaj edukis por si proprajn kontistojn, tiel ke la kontoj de la kooperativoj fariĝas tute klaraj kaj korektaj, favore al la produktado kaj ĝia kalkulado.

La buŝaj kaj skribaj lingvoj de nacimalplimultoj estas ankaŭ vaste uzataj en eldonado, informado, radiel-sendado kaj kino. Tra la tuta lando estas establataj 12 nacimalplimultaj eldonejoj, kiuj grandkvante tradukis kaj eldonis diversajn librojn kaj periodaĵojn en nacimalplimultaj lingvoj. Ĝis 1958 estis eldonitaj sume pli ol 9000 libroj kun eldonkvanto de pli ol 80,000,000 ekz. en 18 nacimalplimultaj lingvoj, inkluzive la mongolan, tibetan, ujuguran, ĝuangan, mjaŭan, bujian, korean, k.a. Speciale notinde estas ke la *Elektita Verkaro de Maŭ Zedong* estas eldonita jam en kvin nacimalplimultaj lingvoj, la mongola, tibeta, ujugura, korea kaj kazaĥa, kio estas granda evento en la politika vivo de nacimalplimultoj. Krome estas eldonataj pli ol 70 ĵurnaloj kaj gazetoj en nacimalplimultaj lingvoj. Starigita estas ankaŭ radiodissenda reto en la nacimalplimultaj regionoj. La centra kaj lokaj radiostacioj ankaŭ enkondukis multajn programojn en iliaj lingvoj. Ekzemple, la Centra Popola Radio-stacio havas programojn en kvin nacimalplimultaj lingvoj, la mongola, tibeta, ujugura, ĝuanga kaj

korea. Ĝis 1958, pli ol 320 filmoj estis tradukitaj en sep lingvoj, la mongola, tibeta, ujgura, ĝuanga, jia, korea, kaj kazaha, kaj estis ankaŭ produktitaj pli ol 70 filmoj, spegulantaj la vivon de nacimalplimulto. Gravan rolon ludis ĉio ĉi tio en akcelado de disvolvado de diversaj konstruaj laboroj de nacimalplimulto.

Dum la kadroj kaj popolamasoj de nacimalplimulto lernas sian propran skribon, ili forte deziras ankaŭ lerni la hanan lingvon. Kaj tio fariĝis amasa movado en multaj regionoj de nacimalplimulto, ĉar la hana lingvo rolas ĉiam pli kiel ĝenerale uzata interkomunikilo inter la diversaj nacioj de nia lando. Ekposedo de la hana lingvo faciligas lernadon ĉe pli evoluinta nacio, kaj ankaŭ faciligas interlernadon inter ĉiuj nacioj.

Prospero de Sanitaraj Aferoj kaj Rapida Kreskado de la Loĝantaro de la Nacimalplimulto

Energie disvolvi sanitarajn aferojn inter naciaj malplimulto, por plibonigi la popolan sanon kaj prosperigi la loĝantaron, estas unu el la plej gravaj laboroj de la Ĉina Komunista Partio kaj registaro en kultura konstruado en la regionoj de nacimalplimulto. Dum dek jaroj grandaj atingoj jam efektiviĝis. Estas grandkvante establitaj higienaj kaj kuracaj institucioj en tiuj regionoj, kaj plenumite disvolvita la patriota higiena movado kun ekstermo de la kvar malutilaj bestoj kiel centro, tiel ke estas efike kontrolataj la seksaj malsanoj, malario kaj aliaj gravaj epidemioj,

(Daŭrigo sur 144)

La Virina Transporta Brigado

— Popolkanto el Tiangin —

Ilustris Miaŭ Di

*Kun steloj ankoraŭ sur nigra ĉielo,
jam venas virina transporta brigado.
Kareoj puŝataj kaj ĉaroj tirataj
plenplenas je karbo kaj gaja ridado.*

*En fluga rapido kuregas kareoj,
rompiĝas sub radoj rospertoj surherbaj.
Jen franjo deŝiris branĉeton kun floro —
“Al kiu donacos ĝin mia aĝ-franjo?”*

*“Jes, en la heroo-kongreso hieraŭ,
sin, trovis Vang Kuj, iu ŝtal-laboristo.
Se vi kor-inklinas al tiu bravulo,
mi sendos por vi am-leteron senpage.”*

*“Vi aĉa bubino!” rediras aĝ-franjo
kaj ŝmiras jun-franjon per rosaj gutetoj.
“Se vi edziniĝi kun tiu deziras,
mi svatos lin por vi kiam ŝtalo abundos.”*

*En fluga rapido kuregas kareoj,
plenplenas je karbo kaj gaja ridado,
viglege kuregas sub steloj kaj luno,
gutgutoj da ŝvito fariĝas ŝtallikvo.*

Trad. Laŭlum



Liu Ŝufang:

Kvin Orfloroj

LA kolora filmo "Kvin Orfloroj" similas al bela poemopentraĵo enhavanta kantojn kaj dancojn. Ĝi vivece priskribas la heroan spiriton de produkta antaŭensaltego kaj feliĉan vivon de Baj-nacio* en Junnan-provinco post fondiĝo de la popolkomunumo.

La junulino, kiun amas la junulo Apon, nomiĝas Orfloro. Ili hazarde renkontiĝas kaj koniĝas unu kun la alia en la printempa festo "Marta Foiro". Ĉe la disiĝo Orfloro al Apon kantas:

*Venontjare floros, flugos papilioj,
venu al mi, se vi volus, fraĉjo
mia.*

*Ĉe l' pied' Cang-monta, serĉu
Orofloron,
Orofloro estas franjo via.*

Post unu jaro, li alvenas al la imponaj Deknaŭ-montpintoj de la Cang-monto, ĉirkaŭirinte la kvietan kaj belan Erhaj-lagon, li trovas kvar Orflorojn, sed neniu el ili estas lia amatino. El serio da miskomprenoj aperas scenon post sceno komedioj, kaj per tiuj detaloj la filmo laŭdas la novajn karakterojn de la homoj.

Kiam li finfine trovas sian amatan Orfloron, li vidas ke kun granda ruĝa floro sur sia brusto, ŝi staras apud la fianĉo sur la estrado kaj trinkas vinon ĉir-

kaŭate kaj tostigate de la gastoj. Kiel li povus scii ke lia amata Orfloro estas la estimata vicestrino de la popola komunumo kaj estas tie kiel atestantino dum la ceremonio por tiu edziniĝanta Orfloro. Estas koraŝirata Apon. Li pensas: ke Orfloro jam tiel edziniĝis al aliulo, do li ne devas rompi ilian feliĉon. Li silente foriras de ŝi. Tamen li ne deprimiĝas pro tio, kaj baldaŭ li sin ĵetas en la bolantan movadon por produkti ŝtalon.

Fine la vicestrino Orfloro ekscias ke la ĵusveninta ŝtalprodukta spertulo estas neniu alia ol ŝia amata Apon. Kvankam ŝia avo treege maltrankviliĝas, timante ke Apon enamiĝus en alia junulino pro sia vana serĉado kaj konsilas al ŝi lasi publikajn aferojn de la komunumo kaj tuj iri renkonti lin. Tamen Orfloro ne tiel pensas, opiniante ke Apon ne ŝanĝus sian koron senpripense, alie li estus neniom aminda. Tie ĉi estas esprimata la spirita fizionomio de la novaj gejunuloj en la antaŭensaltego de nova Ĉinio. En la profundo de ilia sentimento la plej grava estas la

**Baj-nacio: unu el la nacimallimultoj en Ĉinio loĝanta en Junnan-provinco.*

Popolkomunuma vicprezidantino Orfloro (la 2a de maldekstre) enamiĝas al Apon, eminenta konkurs-rajdanto en la Marta Foiro.



Apon donacas sian tranĉilon al la amatino kiel simbolon de fideleco.



feliĉo de la publiko. Ili povas tre nature obeigi sian amon al la socialisma laboro.

Komprenoble baldaŭ malaperis la miskompreno. Ĝuste ĉe la lagbordo, kie ili unuafoje esprimis sian amon unu al la alia, Apon tiel kantas al Orfloro:

*Apud Papilia Fonto estas floro,
aspektante en nebul' kun gazo ora.
Forblovinte l' plenĉielan nubvualon,
mi alprenas Orofloron tutakore.*


Ĉe la produkta kaj konstrua fronto ili estas tiel brave antaŭenmarŝantaj, tamen tiu dolĉa kaj kortuŝa kanto skuante ondetojn sur la lago, esprimas ilian amon belan kaj naivan.

La popola komunumo similas ekleviĝantan sunon. Tie ĉi ĝojplene laboras la vicestrino Orfloro, la Orfloro elĉerpanta lagosterkon, la Orfloro de paŝtejo, la Orfloro serĉanta ferminon, kaj la Orfloro traktorkondukistino. Estas ĝojinde ke aperis sur ekrano la kvin Orfloroj viglegaj, energiaj kaj plenaj de revolucia optimismo. Ĝi estas bela liriko laŭdanta la vivon de Baj-nacio post la popolkomunumiĝo. Plie la aŭtoroj de la filmo teksis kune la belan pejzaĝon de Junnan-provinco kaj la belan menson de novaj homoj,

por ke ili brile radiu kaj ilustru unu la alian. Krome, troviĝantaj en la filmo belaj popolkantoj kaj

riĉaj kaj buntaj popoldancoj de Baj-nacio, ankaŭ estas multe aplaŭdataj de la rigardantaro.

Serĉante la amatinon Apon, mistrakis alian Orfloron kaj kantiokas sin eliri el la brutoakusejo.



La popolkomunuma vicprezidantino donacas al la traktorisino Orfloro sian brodaĵon je sia edziniĝo.



floro pensas pri sia amato kiam denove proklamas la dato de la Marta Fofo.



Finfine la geamantoj revidas unu la alian.



ERLANG KAJ LA SEP SUNOJ

Sur la orienta bordo de Ĉaŭbaj-rivero, oriente de Pekino, sin trovas la vilaĝo Vejgiadian, ĉe kies okcidento estas monteto, sur kiu staras la Templo de Erlang. Sur roko ĉe la nordorienta angulo de la montsupro, troviĝas kavo en formo de plandumo, kaj dekstre de la kavo, ne malproksime, unu puto. Inter tieaj loĝantoj estas interrakontata la legendo pri "Erlang kaj la sep sunoj":

En tre, tre antikva tempo, ekzistis tiam kune sep sunoj. Apenaŭ unu subiris, jam leviĝis alia. Ili alternis, unu tuj sekvante alian, sen interrompo, kaj neniam mallumis la ĉielo. La tutan tagon oni estis preme sufokataj de la varmego. Se oni metus pecon da pasto sur muron, ĝi estus tuj roste karbonigita. Sennombraj homoj mortis pro la varmego. La popolo ĉiam pensas kun ĉagreno en la koro: "Estas



La Katoj Deziras Ŝanĝi Sian Profesion

— Popolkanto el Liu'an-gubernio,
Anhuj-provinco —

Ilustris Juan Junfu

*Katoj sen labor' ĝeniĝas de l' ted-hor',
venas ili kunen por interparol':
Musoj, ratoj, idoj tute ekstermiĝis,
ni ne devas senlabore grenon manĝi,
tuj rapidu peni profesion ŝanĝi.*

Navede Kuras sur Rivero Fiŝ-boatoj

— Popolkanto el Hunan-provinco —

Ilustris Mi Gu

La cent-lia fluo ondas persikflore,
sur-rivere fiŝ-boatoj navedkuras,
Remas amatino kaj l' amato ret-ĵetadas,
ret' post reto ili kaptas la printempon.*

* Lio = ½ kilometro.

Trad. Laŭlum



tro multe da sunoj, kiel tenos sian vivon la homoj!" Sed neniu el ili havis ian kontraŭ-rimedon.

Ĝuste tiam aperis viro nomata Erlang, kun staturato alta, vizaĝo nigrebruna kaj korpo tre fortika. Li ankaŭ malkontentis pri tromulteco de la sunoj. Aŭdinte la plendojn de la popolo, li ankoraŭ pli koleriĝis en si, kaj firme decidis iri por batali kontraŭ la sunoj. Tion sciinte, la popolo treege ĝojis. Kien ajn Erlang iris, lin bonvenigis ĉiuj.

Ĉe la komenco, kiam Erlang postkuris la sunojn, kaj kaptis unu, li ne trovis lokon por teni ĝin, kaj ĝi tuj forkuris, dum li komencis kapti la duan. Kaj kiam li kaptis la trian, malaperis same jam la dua. Li ĉiam ne sukcesis ilin subigi al si.

Poste, li elpensis rimedon: li portis surŝultre du montojn per vektego kaj ekĉasis la sunojn. Ĉifoje li tuj premis sub la monton ĉiun sunon, kiun li kaptis. Post longa persekutado, li fine sukcesis subpremi jam ses sunojn. Tiam, Erlang iom laciĝis pro la kurado, kaj mem ne memoris kiom da sunoj li jam kaptis kaj kiom restas ankoraŭ nekaptitaj. Li do daŭre postkuris antaŭen senhalte.


Iun tagon, atinginte la orientan bordon de Ĉaŭbaj-rivero li estis efektive tro laciĝita, kaj eksidis por iom ripozi. Tiam li eksentis doloretan ĉe la piedoj. Demetinte la ŝuojn, li trovis vezikojn sur la piedoj, kaj en la dua ekrigardo trovis tre multe da ŝtoneroj en la ŝuoj, li ne povis deteni sin de rido: "Ha, estas vi, kiuj turmentas min!" Li elŝutis la ŝtonerojn, kiuj formiĝis tuj la monteto, nun situanta okcidente de la vilaĝo Vejgadian.

Refreŝiĝinte per ripozo, Erlang surmetis la ŝuojn kaj reprenis la vektegon por iri kaj rigardi sur la monton, kie la suno nun estas. Sed li neniel povis ĝin trovi. Ĝuste kiam li malpacientiĝis, li vidis, ke leviĝis el la oriento la suno. Erlang batis la teron per la maldekstra piedo kaj per la vektego tenata en la dekstra mano, laŭte kriegante: "Kien nun vi povas forkuri?" La kriego terurigis la sunon, kaj tiu sin retiris.

Kiam Erlang malsupreniris de sur la monto, la suno jam malaperis. Ĉagrenite enkore, li vidis amason da popolanoj venantaj renkonte kaj alparolantaj lin ridetante: "Ne necesas plu persekuti ĝin, Erlang, nun restas nur tiu ĉi suno sola." "Kiel vi tion eksciis?" demandis Erlang. Iu popolano respondis: "Tiutage mi iris en kampon kaj vidis unu sunon plorantan sub portulako.* Mi demandis ĝin kial ĝi ploras. Ĝi diris: 'El niaj sep fratoj ses pliaĝaj estis ĉiuj premitaj de Erlang sub la montoj, nun restas nur mi sola, sed li ankoraŭ ne volas min indulgi. Kion fari?' Ĉe tio ĉi Erlang eksplodis per rido: "Ha, ha, restas nur unu suno sola, do mi ĝin indulgos. Bonvolu ĝin venigi ĉi tien, mi havas vortojn por ĝi.

La popolanoj alkondukis la sunon, al kiu diris Erlang: "Mi ne malliberigos vin, sed vi devas sekvi la vorton de la popolo, ne estu maldiligenta, nek tro komplezema, leviĝu matene el la oriento, kaj reiru vespere en la direkto de la okcidento. La homo bezonas ripozon, kion ankaŭ vi." La suno tuj konsentis ĉion volonte.

* *Portulaca Oleracea*: kreskajo malfacile sekigebla per sunumo, laŭ legendo, la suno ne volas ĝin sekigi por rekompenci ĝian bonfaron, esti savinta la vivon de la suno.



Fari Kukurb-laŭbon

— Popolkanto el Hebej-provinco —

Ilustris Mi Gu

*Kukurbfolioj,
kiel pelvo grandaj,
geamantoj faras kukurb-subtenilon.
Unua ligas,
alia nodas,
ho junul', ne piedpremu kukurbflorojn.
Kukurbplantidoj,
vi kreskrapidu.
Ramptigoj longaj,
folioj grandaj,
grimpu laŭ la sorgaj tigoj,
plene kovru l' subtenilon.
Ke la fruktoj kaŝu sin sub foliaro,
vang' ĉe vang' flustrante konfidence.*

Trad. Laŭlum

Problemoj de traduka laboro Esperanten

Jene ni aperigas la tezojn de la samtitola verko de Sovetia pionira esperantisto Docento V. N. Basov

1. Unu el la plej ĉefaj taskoj de niaj verkistoj devas esti el-laborado de la lingvo. Pro certaj kaŭzoj en Esperanto dominas la tradukverkoj. Tial decas ke ni pristudu la taskojn de la tradukistoj.

2. Italoj diras: "Traduttori traduttori" — tradukistoj estas perfiduloj. Iuj opinias tradukon utopio.

Malgraŭ tio ni vidas, ke ĉiu verko estas tradukebla. Se signifoj de apartaj vortoj el diversaj lingvoj ne ĉiam koincidas, la lingvoj ĝenerale koincidas kaj esprimas la samon.

Estas konate, ke inter ĉiuj lingvoj la lingvo Esperanto havas gravajn avantaĝojn.

3. Tamen la tradukisto ofte renkontas barojn, kaj la ĉefa estas — nuancoj, propraj al ĉiu lingvo, tio, kion oni nomas spirito de la lingvo. Ili reflektas la evoluon de la lingvo en la plej profundaj tavoloj de la popolo ĝin uzanta.

Tiel naskiĝis parolturnoj, parolfiguroj, ofte tro simbolaj, nur konsentitaj kaj pro tio malfacile tradukeblaj.

4. La historio de tradukarto montras, ke iuj tradukistoj celis laŭvortan tradukon, serĉante al ĉiu vorto ĝian korespondanton, kvazaŭ enskribante inter la linioj de la originalo vortojn en alia lingvo (sublinia, vort-en-vorta traduko); aliaj eĉ tute aliigis la sencon kaj karakteron de l' originalo por fari la verkon pli agrabla.

5. La vera vojo de tradukisto — ĉiam zorgi pri plena adekvateco inter originalo kaj ĝia traduko. Do, adekvata laŭ la senco, sed ne laŭ formo.

Por tio li devas:

a) tutplene posedi la fremdan lingvon kaj scipovi distingi kaj diferencigi ĉiujn nuancojn;

b) diferencigi kaj distingi ĉiujn nuancojn de sia gepatra lingvo;

c) eviti tradukon subliniajan. "Traduko ĉiam estu pli ol sumo de unuopaj vortoj" (Gregor. Esperanto, 1958, okt.);

ĉ) labori kun krea preteco, sen inklino al simpla kopiado, studinte la laboratiron de l' verkisto;

d) kompreni internan ideon de l' originalo, la tutan verkon, atenti la tempon en kiu ĝi estas verkita kaj la priskribitan epokon;

e) bone memori la edifon de Zamenhof: "La vera stilo Esperanta estas nek slava, nek germana, nek romana, ĝi estas — aŭ almenaŭ devas esti — nur stilo simpla kaj logika";

f) li reprezentu en sia taksto personecon, literaturan manieron kaj stilon de la tradukata verkisto;

g) li konscie imitu voĉmanieron, gestojn, esprimparolon de la priskribitaj homoj, por ke tradukita verko konservu ĝustecon kaj aŭtentikecon al la originalo; pro tio ne estas permesataj ellasoj aŭ aldonoj aŭ ŝanĝoj en la originalo;

ĝ) bona verko restu bona kaj malbona restu malbona, ne plibonigita;

h) dispecigoj de tro longaj aŭ komplikaj frazoj ne kripligas la verkon.

6. La tradukanto bone konsultiĝu kun la tuta teksto, komprenu socian kaj emocian nuancon de ĉiu vorto kaj ne estu sklavo de la vortaro, sed zorge elektu la bezonatan vorton, li donu bildon per bildo, sed ne per vortoj.

7. La tradukanto zorgu ke lia lingvo estu bela kaj bona, ke la frazoj kaj la vortoj estu facile prononceblaj kaj kompreneblaj.

Belsoneco, muzikeco, akreco de la lingvo lumu en la tuta lia

laboro; eĉ amasiĝo de samaj sonoj preskaŭ ĉiam malbeligas la lingvon.

8. Kiam oni trovas koincidantan vorton aŭ esprimon, oni diras ke la traduko estas ekvivalenta; sed kiam la ekvivalento ne estas trovebla en la vortaro aŭ ne estas trovita analogiaĵo pli-malpli proksima laŭ senco, tiam oni serĉas adekvatan ŝanĝon:

a) per interpreto, klarigo per kelkaj vortoj;

b) per antonima traduko, t. e. kun helpo de kontraŭa parolturno (zorgu=ne malatentu);

c) per kompenso, kiam la ideo estas donita alie, ol en la originalo (есть пирог с грибами, держи язык за зубами = vortojn ŝparu, agojn faru);

ĉ) per uzo de nekutima parolturno.

9. La vortoj parazitantaj, vulgarecaj kaj eĉ frazoj, nevaloran-

Interparolo

Kun samideano A. C. Barnes, membro de la delegitaro de la Anglia-Ĉinia Asocio de Amikeco, vizitanta Pekinon, ni havis ĝojan intervidon kaj interesan interparolon je la 21-a de majo.

Interalie li levis la demandojn, kial troviĝas malmultaj esperantistoj kaj kia estas la perspektivo de Esperanto en Ĉinio.

Li opinias, ke eble Esperanto estas lingvo fundamente eŭropa kaj tial ne tiel facila por la ĉinoj kiel por la okcidentanoj.

Niaopinie, tio ja estas unu el la gravaj kaŭzoj. Plej multe el la ĉinaj esperantistoj povoscias unu aŭ eĉ plurajn eŭropajn lin-

taj tradukon estu ellasitaj; la tradukanto ie nur mencias la malpurecan lingvon de l' aŭtoro, eble en piednoto aŭ antaŭparolo.

10. Lingvaj naciaĵoj ne havantaj ekvivalenton en Esperanto kaj uzataj nur en la sola lingvo, ne estas tradukindaj, krom la okazoj, kiam la vorto signas iun novaperintan objekton aŭ agon.

11. Pri idiomaĵoj d-ro Zamenhof skribis: "Naciajn idiotismojn, kiuj ne prezentas necesajn, ni devas kompreneble eviti kaj ni devas peni traduki ilian sencon en maniero plej logika kaj internacia; sed tiajn esprimojn, kiujn ĉiu lingvo nepre devas posedi, ni devas peni en tiu aŭ alia maniero nepre traduki, sed ne simple eviti ilin (Lingvaj Respondoj).

12. La problemo de transskribo de propraj nomoj en Esperanto dume ne estas bone solvita kontribue al egalrajteco de ĉiuj lingvoj, tamen devas esti malpermesinda uzado de iuj ajn-signetoj apud la literoj kaj ankaŭ de literoj ne troviĝantaj en Esperanta alfabeto. Familinomoj ĉiam estu doniaj fonetike.

13. Ĉio ĉi dirita rilatas ne nur prozon, sed ankaŭ versajn verkojn.

14. Se estas tradukata iu oficiala dokumento, ni zorgu pleje la vortan ĝustecon.

Se ni havas belarton — unue staras belarteco kune kun la ideo de l' verko kaj leganto ne emas ĉikani pri iuj negravaj malkongruoj inter la vortoj de originalo kaj ĝia tradukajo.

15. Esperanto estas ankaŭ vivanta lingvo, kiel la naciaj, ĝia leksikona riĉeco ĉiam kreskas pli rapide ol en naciaj lingvoj; tial ni estu treege singardemaj kaj ĉiun novan vorton, kiu penas eniĝi en Esperanton, ni zorge ekzameni ĉiuflanke.

Sinonimoj kaj homonimoj en Esperanto valoras esti studotaj de tradukistoj kaj vortaristoj.

16. Ĉiu eraro flanke de tradukisto ne nur malbonigas la originalon, sed kripligos la ideon internacia lingvo mem; la legado de Esperantaj klasikajoj, de vortaroj Esperantaj, nacia-Esperantaj kaj de nacia-naciaj estas nepra kondiĉo por akiri la lingvon.

17. Vera verkisto-tradukisto bone ekspertizas sian tradukon

kaj altiras kritikistojn, dezirinde diversnaciajn por konsultiĝi kun ili pri siaj "protradukaj turmentoj".

18. Ĉi tie estas skizitaj la vojoj, irendaj de tradukisto ĝenerale; la problemo estas tre grava por internacia lingvo ol por la nacia.

En ĉiu lingvo ekzistas specifikaĵoj ofte nerenkontataj en aliaj lingvoj, do aparte staras la tasko ellabori specialajn regulojn por traduka laboro el ĉiu nacia lingvo aparte; same por versa traduko.

19. "Estas tre dezirinde, ke ni ne evitu malfacilajn tradukojn — sed kontraŭe, ke ni ilin serĉu kaj venku, ĉar nur tiamaniere nia lingvo plene ellaboriĝos" (Zamenhof *Lingvaj Respondoj*).

20. Antaŭ ni staras la problemo montri la pravecon de la ĵus diritaj vortoj de Esperanta poeto Gaston Waringhien: "Se preskaŭ senescepte ĉiu traduko signifas malpliriĉigon aŭ kolorŝanĝon — la Esperanta havas tiun valoran avantaĝon transpreni kaj transdoni ĉiujn detalojn de la originalo."

Docento V. N. Basov

pri la Internacia Lingvo

gvojn. Al tiuj, kiuj povoscias nenian alian lingvon krom la ĉinan, Esperanto ne estas tiel facila. Al ili eĉ la lernado de prononcado de silaboj estas granda malfacilaĵo. Tamen, ŝajnas al ni, ke la malriĉeco de la enhavo de esperantaj eldonajoj estas alia gvava kaŭzo, pro kiu malmultaj ĉinoj lernis Esperanton kaj multaj el tiuj, kiuj ĝin lernis, facile ĝin forgesis. Ili pensas, ke la riĉe nhava rusa, angla aŭ aliaj fremdaj lingvoj estas pli lernindaj kvankam malpli facile ellerneblaj.

Ni pensas, ke Esperanto havas brilan perspektivon en Ĉinio.

Unue, la disvastigo de la fonetika alfabeto de la ĉina lingvo multe faciligos la lernadon de Esperanto al ni ĉinoj. Due, ju pli la orientanoj uzos Esperanto, des pli pli da internacieco ĝi posedos kaj tiel des pli facile ellernebla ĝi fariĝos al la orientanoj. Trie, ju pli riĉa la enhavo de la eldonajoj esperantaj, des pli Esperanto allogas al si seriozajn lernantojn kaj entuziasmajn adeptojn. Se ĉiuj popoloj tra la mondo eldonos en Esperanto gazetojn kaj librojn, diskonigante siajn konstruadon, bataladon, vivon kaj kulturon, Esperanto

sendube fariĝos la plej lerninda kaj lernenda lingvo en la mondo.

Samideano Barnes esprimas sian kredon, ke Esperanto estas unue valora ilo por internacia reciproka kompreno kaj defendo de la mondopaco; kaj due, bona helpilo por faciligi la lernadon de fremda lingvo. En Britio, li diris, oni iam faris tian eksperimenton, ke en unu el du klasoj de la franca lingvo oni instruis Esperanton al gelernantoj en la unua jaro, kaj la francan en la sekvantaj jaroj; dume en la alia klaso oni instruis nur la francan lingvon dum ĉiuj tri jaroj. Fine, la gelernantoj de la unua klaso, kiuj lernis la francan lingvon nur de la dua jaro, atingis pli bonan rezulton, ol tiuj de la alia klaso.

Ilin kaj Fon

Esperanto Marŝas

ranto (el Fund. de Esp.) kaj solvoj de ekzercoj.

La unua esperanta eldonaĵo el Koreio

Ĝus nin atingis la pliampleksigita junia numero de "Paco", kun riĉa enhavo kaj 12-paĝa grava aldono. Laŭ nia scio ĝi estas la unua esperanta eldonaĵo el Korea Demokratia Popola Respubliko. Gratulinda estas la unua sukceso de la koreaj esperantistoj en sia batalo por la defendo de mondpaco.

En Lvov, USSR

La Esperanto-movado en Lvov, ĉefurbo de okcidenta parto de l'

Novaj E-libroj en Ĉinio


Ĝus eldoniĝis la anoncigitaj E-eldonaĵoj **Ĉina Antologio**, la plej granda E-libro aperinta ĝis nun en Ĉinio kaj la dua bildokarto-serio **Floroj kaj Birdoj**, kies antaŭa serio **Homoj** jam elĉerpiĝis.

Eldoniĝis antaŭ nelonge ankaŭ la dua volumo de **Esperanto-Lernolibro** por komencantoj kom-

pilita de k-do Venlo Fon kaj eldonita de la Komerca Presejo. Tiu ĉi volumo ampleksas 205 paĝojn. Kune kun la unua volumo (168 pĝ.), ĝi formas la plej ampleksan E-lernolibron eldonitan ĝis nun en Ĉinio. En ĉi tiu volumo estas ok lecionoj detale klarigantaj la ĉefajn vortspecojn de la lingvo. Ĉe la fino troviĝas aldonoj pri interpunkcio, metriko, la plena gramatiko de Espe-

Jam Aperis

ĈINA ANTOLOGIO



Unu el la Plej Imponaj E-Libroj Eldonita en Ĉinio

15.3 × 28 cm., 412 p. en bela bindo kun protekta kovrilo k 14 bildoj, inkluzive 3 kolorajn.

Aperis ankaŭ **Bi'dkarto Serio II Floroj kaj Birdoj** konsistanta el 8 plurkoloraj deŝireblaj il. pk. kunigitaj en broŝuro.

PREZO - TABELO

Lando	Ĉina Antologio	Floroj k Birdoj
Sovetunio	12 rb.	80 kop.
Usono	2 dol.	0.20 dol.
Britio	10 ŝil.	1 ŝil.
Nederlando	7 gld.	0.50 gld.

Francio	8 fr.	0.70 fr.
Germanio-okc.	6 Gm.	0.60 Gm.
Italio	1000 lir.	100 lir.
Belgio	100 b. fr.	8 b. fr.
Japanio	500 yen.	50 yen.
Finnlando	500 f.m.	50 f.m.
Jugoslavio	600 din.	50 din.
Svedlando	10 kr.	0.70 kr.

Atentu!

Por neindikataj landoj la perantoj kalkulu laŭ la supre donitaj prezoj.

Poŝtmarkoj de la Ĉina Popola Respubliko kaj *Mi volis viziti lernejon* estas ankoraŭ riceveblaj, sed restas ĉe ni nur malmultaj ekzempleroj de la novelaro *Por nova afero, nova maniero*.

Ukraina Respubliko estis tre vigla ĝis 1939 j. Ni havis sufiĉe fortan organizadon kun multnombra anaro. Post milita interrompo, pro kiu suferis ankaŭ Esp. movado, ni denove revigligis nian agadon. Ĉe Domo de Sciencistoj estis fondita en 1958 j. Esp. sekcio, al kiu apartenas junaj kaj maljunaj esperantistoj, ankaŭ veteranoj i. a. tre aktiva senlaca pioniro de Esp. movado, delegito kaj dumviva membro de UEA s-ano A. A. Koĥ.

Niaj samideanoj gvidis kelkajn kursojn en Universitato, Politeknika kaj Medicina institutoj, en Biblioteko de Alilanda Literaturo k.t.p.

Sekvante la noblan ekzemplon de alilandaj pacbatalantoj nia junularo organizis junularan grupon "Sonorilo", kiu rilatas kun multaj tiuspecaj organizaĵoj. Niaj kunvenoj, kunsidoj okazas ĉiumarde vespere.

Domo de Sciencistoj/Esp. Sekcio

Studo pri Eroŝenko en Japanio

Kiel montrite en la artikolo "V. Eroŝenko" sur p. 195 de nia revuo

no. 6, 1958, la blinda esperantisto el Rusio, multe laboris en Ĉinio kaj Japanio. Tial la ĉinaj kaj japanaj esperantistoj kaj ankaŭ la verkistaj rondoj ofte lin rememoras. Por studi kaj gardi liajn literaturajn produktojn, pasintjare en Japanio eldoniĝis 3-voluma "Kompleta Verkaro de Vasilj Eroŝenko" kompilita de s-ano I. Takasugi, konsilanto de Japana Esperanto-Instituto. La unua volumo entenas liajn verkojn skribitajn en Japanio, la dua volumo — tiujn en Ĉinio kaj Sovetio, kaj la tria volumo — biografion de Eroŝenko verkitan de la kompilinto kaj rememoraĵojn pri li de kelkaj liaj intimaj amikoj. Valorajn laborojn faris la kompilinto por studo de la blinda poeto. Aparte interesa por ĉinaj esperantistoj estas tio, ke el la ilustraj bildoj troviĝas reprodukto de esperanta dediĉo de Lusin, la Gorkij de moderna ĉina literaturo, sur lia traduko de la Fabeloj de V. Eroŝenko. Tio pruvas, ke Lusin estas ne nur amiko de Esperanto, kiel li plurfoje sin montris, sed ankaŭ lerninto de la lingvo.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURA

Kongreso de herooj en eduka kaj kultura kampoj

Kune kun la granda antaŭensalto en la ekonomia konstruado, Ĉinio akiris ankaŭ senprecedencajn atingojn en eduka kaj kultura frontoj. Por honorigi la elstarajn laborantojn, interŝanĝis spertojn kaj anatŭenpuŝi la kulturalan revolucion al nova alta tajdo, okazis en Pekino de la 1-a ĝis la 11-a de junio Tutnacia Kongreso de Antaŭirantaj Grupoj kaj Laborantoj en Eduka, Kultura, Sanitara, Sporta, Ĵurnalisma Kampoj de Socialisma Konstruado. Partoprenis pli ol 6,000 reprezentantoj el 28 provincoj, muni-

cipaloj, aŭtonomaj regionoj, instancoj de la centra registaro kaj trupoj de la Popola Liberiga Armeo. La gvidantoj de la Partio kaj la centra registaro ankaŭ ĉeestis la solenan malfermon kaj faris raportojn en la kongreso. En la plenaj kaj fakaj kunsidoj, la reprezentantoj senrezerve interŝanĝis siajn progresajn spertojn. Ili decidis, kune kun la tutlanda popolo, antaŭenpuŝi la kulturalan revolucion al nova alta tajdo, konforme al la granda antaŭensalto en industrio kaj agrikulturo, al la kampanjo de popola komunumo en la kampanjo kaj la urbo kaj al la teknikaj renovigo kaj revolucio.

Korektoj

Ni petas atenton de niaj legantoj pri la korektendaĵoj, enlasitaj en nia revuo n-ro 3 (60). Bonvolu legi:

p. 95, dekstra kolono, L. 14 sube:

La senĉesa reformado de produktaj interrilatoj kaj superkonstruaĵo

p. 96, maldekstra kolono, L. 16 de malsupre:

. . . . por transiro de la kolektiva posedsistemo al la tutpopola kaj por transiro de socialisma socio al la komunisma en la kampanjo.

p. 96, dekstra kolono, L. 16:

Li diris ke en 1960 ni devas. . . .

p. 97, maldekstra kolono L. 8 de malsupre:

. . . . de ĉirkaŭ unuoblo kompare kun 1959.

p. 119, sube, maldekstra kolono, L. 7.

. . . . dum la unuaj 8 jaroj post la Liberiĝo en 1949.

p. 120, maldekstra kolono, L. 13 de malsupre:

. . . . ribelintaj mastrosinjoroj estas aplikata la politiko, "kiu kulturas, tiu rikoltas", kaj al la mastrosinjoroj ne partoprenintaj la ribelon, estas aplikata la politiko redukti ter-renton kaj interezon.

p. 120, maldekstra kolono, L. 6. de malsupre:

1,125 (anstataŭ 1.125).

p. 124, dekstra kolono, L. 5:

al Ĉefministro J. Nehru. . . .

La red.



SUR NIA LIBROBRETO

Bulgario — Jen libreto kun formo belega kaj enhavo tre riĉa. Por legantoj nebulgaraj ĝi prezentas veran enciklopedieton pri Bulgario. En la dense kompostitaj 280 paĝoj S-ro Bojan Balabanov, la redaktoro, per tre konciza stilo skizis la tutan fizionomion de Bulgario: de ĝiaj naturaj kondiĉoj ĝis homaj klopodoj, de historiaj bataloj ĝis la heroaj socialismaj konstruadoj, de la materiaj sukcesoj ĝis la spiritaĵoj. Sendube ĉiu leganto trovos por si interesajn partojn. Laŭ mi, la plej instruaj ĉapitroj estas “Nacia ekonomio” kaj “La zorgo pri la homo — supera leĝo”. En la ĉapitro “nacia ekonomio” oni vidas ne nur la rapidegan progreson en la naciaj konstruadoj dum la du jarkvinoj dank’ al la socialisma karaktero, sed ankaŭ la pli belan perspektivon en la proksima estonto. La faktoj kaj la konkretaj ciferoj draste kontrastas kun la stagnado kaj ekonomiaj krizoj en la kapitalismaj landoj. Des pli instruaj estas la priskriboj en la ĉapitro “Zorgo pri la homo — supera leĝo”. Dum en kapitalistaj landoj la laborhomoj estas ekspluatataj, subpremataj kaj minacataj ĉiam de la demonoj senlaboreco, persekutado kaj milito, en Bulgario, samkiel en aliaj socialismaj landoj, la registaro celas ĉiam por pli plena kontentigo de la kreskantaj materialaj kaj kulturaj bezonoj de la popolo. La altigo de laborsalajroj, la malaltigo de varprezoj, la pligrandigo de la konsumado, la laborpensioj, la pagataj libertempoj, la senpagaj

por ĉiuj medicinaj servoj, la zorgoj pri infanoj kaj patrinoj kaj ĉio simila donas nediskuteblajn pruvojn pri la supereco de socialismo super la kapitalismo, sub kies jugo la laboruloj devas batalakiri per ŝvito kaj eĉ sango la vivrajton.

La belaj fotoj riĉe ilustrantaj tiun ĉi libreton kaj la du multakolore presitaj mapoj multe helpas al la legantoj formi por si konkretajn bildojn pri la progreso. La lingvo estas klara kaj flua. Preseraroj estas malmultaj. Ambaŭ la formato (12 × 17 cm.) kaj la laktola bindo kun verda koloro kaj ore presita titolo estas plaĉaj. Prezo neindikita.

H. F.

JUGU MEM (Faktoj pri Ĉeĥoslovakio) — Post la libroj “Pollando”, “Bulgario” jen venis simila, kvankam multe modesta kaj iom dokumenteca broŝuro el Ĉeĥoslovakio. La broŝuro dividiĝas en 10 partoj. El ili la legantoj povas ricevi klaran bildon pri la loĝantaro kaj historio, la reĝimo, la civitanaj liberrajtoj, la strukturo de l’ industrio, komerco kaj agrikulturo, la socio kaj familio, sanitara prizorgado, kulturo kaj sporto k.a. en Ĉeĥoslovakio. Eble estas interese al multaj legantoj, ke ĝi informas ne nur la atingojn, sed ankaŭ la detalajn paŝojn kaj konkretajn manierojn por akiri tiujn atingojn. Ekzemple en la paragrafoj pri agrikulturaj kooperativoj, oni informas kiel la terkulturistoj laboras en la kooperativoj, kiel oni difinas la

laborunuojn, kiel oni dividas la rikoltojn ktp.

La lingvo estas klara, kvankam troviĝas en ĝi kelkaj ne tre necesaj neologismoj, ekz-e, *kolaboratoro* anstataŭ *naciperfidulo*, *okupacio* anstataŭ *okupado* ktp.

La broŝuron eldonis la ŝtata eldonejo ORBIS en Praha. Oni povas ĝin ricevi de la eldonejo kontraŭ unu respond-kupono.

H. F.

Anekdotoj pri la vivo de Prezidanto Ho Chi Minh — Jen la sesa libro, kiun niaj vjetnamaj kamaradoj kontribuis al esperanta literaturo en la mallonga daŭro nur de tri jaroj. El la titolo oni jam povas konjekti, ke ĝi estas libro tre interesa kaj sopirata. Ja la vivo de Prezidanto Ho Chi Minh estas viva historio de la revolucio de Vjetnamio. Jam de la junaĝo li sin dediĉis al la deziro de la sendependeco de sia patrio. Liaj aventuroj, klopodoj, ĝojoj kaj suferoj estas ĉiam por aŭ pro la sama celo. Per klara vido li trovis la ĝustan vojon por efektiviĝi la sopiron de la tuta vjetnama popolo, kiun ne sukcesis efektiviĝi liaj antaŭuloj. Tial la vivo de Ho Chi Minh, la amata prezidanto de Vjetnamio, povas doni multajn instruojn kaj inspirojn al batalantoj por sendependigi sian nacion, kiu estas ankoraŭ sub la jugo de koloniismo.

Kiel asertis S-ro Tran Dan Tien, verkinto de tiu ĉi libro, al ĝi mankas ankoraŭ multaj aliaj epizodoj de K-do Ho Chi Minh, kaj ĝi tute ne pretendas sin bona biografio de la vjetnama prezidanto. Tamen la verkinto ja talente teksis la izolajn rakontojn en unu tutan bildon de K-do Ho Chi Minh. La tradukon faris K-do Nguyen Minh Kinh en pli senripoĉa kaj flua stilo. Diskutindaĵ estas nur la uzoj de *ne post timo*, ekz-e “pro timo, ke S-ro Nguyen *ne* ĝin uzus por sin memmortigi” (sur p. 74, simila kazo troviĝas sur p. 83. Tie oni devas forstreki

la vorton *ne*), la formojn *internacionalo* anstataŭ *internacio*, *rekonkeri* (sendependecon) anstataŭ *reakiri*.

Prezo neindikita. Oni povas ĝin mendi ĉe SO ZUAT NHAP KHAU SACH BAO, 32 Hai Ba Trung, HANOJO, Vjetnamio.

H. F.

MONTO DE L' VIRINO—Kolekto de vjetnamaj legendoj 96 p. Formato 12 × 19 cm. Eldonita de Fremdlingva Eldonejo, Hanojo; kunlabore de la E-Klubo de Hanojo, 1959.

Ĝi konsistas el 13 legendoj, kiuj donas al legantoj grandan intereson ne nur pri la fabelaj rakontoj mem, sed ankaŭ pri scioj de la tradiciaj moroj kaj kutimo, sapiroj kaj aspiroj de la vjetnama popolo en la malnova tempo, kaj valoraj ankaŭ por la studentoj de etologio.

Per la unuaj linioj, la libro jam altiris la atenton de la leganto pri la pejzaĝo de vjetnama vilaĝo, ni legu: “. . . kabano kun simpla linio . . . malantaŭ ĝi, etendiĝis ĝis profunda arbaro eta maldensejo, laŭ kies bordo torenteto rulis sian neelĉerpeblan akvaron. . . . Du aŭ tri etaĝaj rizejoj, akvoprovizitaj de la torento, kelkaj kokinoj kaj babilemaj anasoj, manĝujo kun rondforma foliaro kaj areto da bananarboj kreskantaj apud la kabano. . . .” Ĉu tio ne bildigis al ni la naturan belecon de la vjetnama vilaĝo?

En la paĝoj sin trovas multaj interesajoj, kiaj estas virta amo de la virino kiu atendas revenon de sia forvojaĝinta edzo; monavida kaj mallaborema homo droninta ĝis la mara profundaĵo sub pezo de juvelŝtonoj; fantazia deveno de moskito, bubalo, eĉ la nigraj strioj sur tigro ktp. ktp.

Des pli interese estas por ĉinaj legantoj ke en Ĉinio ankaŭ disfamiĝis tia legendo kia belulino aperis el bildo kaj enamiĝis al juna viro, kaj al ni ankaŭ konataj la Drako-reĝo, Imperiestro de

Jado kaj Ĉiela Palaco k.c. Ĉar ili ankaŭ troviĝis en ĉinaj legendoj.

Ni ĝojas pri la eldoniĝo de la libro, kiu havigis al ni plian gemon en la Esperanta literaturo.

Dum legado mi trovis kelke da preseraroj, nome, “infanaĝo amiko” (p. 26, parag. 3), “dormeulo” (p. 43, parag. 3), “trapikaj” (p. 44, parag. 1), “*Sim algajege*” (p. 86, parag. 4). Mi esperas, en la dua eldono ili estos korektitaj.

Zensto

Le Docteur Esperanto — Franca traduko de la verko de Maria Ziolkowska, “Doktoro Esperanto”. La originalon ni jam recenzis sur paĝo 88 de la 2-a numero de nia gazeto, ĉijare. Nun ĝi estas tradukita en francan lingvon kaj eldonita de “Editions Françaises d'Espéranto” (11, rue Paul-Vergnes, MARMANDE, Francio). Prezoj: broŝurita, 6.50 fr.; bindita, 13.50 fr.

Deziras Korespondi

Ĉar tro multe da korespondopetaj leteroj svarmas ĉe ni, estas neeble por ni respondi al ĉiuj kaj publikigi la anoncetojn ĝustatempe pro manko de spaco. Kompreneman pardonon!

* **Nikola Zahariev**, inĝeniero-metalurgo dez. kor. tutmonde kaj interŝ. bk. resp. garantiata. str. “Grigor Sotirov” 34, Plovdiv 4, Bulgario.

* **Por aranĝi tutmondan ekspozicion pri pedagogia kompara studo** mi dez. ricevi ABC-lernolibrojn uzatajn de la unua klaso de elementa lernejo, kaj plej novajn lernolibrojn, rekompencos per simila literaturo de nia lando. Mi kredas ke la tutmonda espistaro povos helpi al mi por aranĝi la aferon kiu havas grandan kulturan signifon. Mia adr: **L. V. Savĉenko**, pr. Lenina 3, kv. 65, Rostov-Don 38, USSR.

* **Agronomo de urbĝardeno, Karlo Danszki**, dez. interŝ. semojn de floroj, arboj kaj arbustoj, Komaromi -u. 18, GYULA, Hungario.

* **Bruno Klava**, Talsas, Laidres-str. 11, Latvio, Sovetunio dez. interŝ. pk., bk. kaj gazetojn pri kino kun ĉl.

* **Paul Weyda**, Bürgermeister a. D. Stuttgart-Rot, Auricher str. 47/Eg. Germanio-okc.

* **Azarov Viktor**, Celinnaja 6, kv. 7, Novorossiĵsk, USSR.

* **Vija Stanceviĉa** (24-jara dancistino), dez. kor. kun orientaj landoj, P. Stučkas 38-16, Riga, USSR.

* **Aleksandr Vasin**, Semaŝko 44/46, kv. 1, Rostov-Don, USSR. Dez. kor. pri ĉt. kaj interŝ. FI. fotojn k.a. kun ĉl.

* **Esp-rondeto “La Ondo”** dez. kor. pri ĉt. kaj interŝ. pm. IPK. gasetojn, ĵurnalojn, librojn, albumojn kaj alumetetiketojn. **A. Milbergs**, Tukuma 20-1, Ventspils, Latva SSR. USSR.

* **Mati Enno**, Kohtla-Järve, Pioneeri 11-5, Estonio, USSR.

* **Ailan Ruut**, Kohtla-Järve, Narva mnt. 77-17, Estonio, USSR.

* **F-ino Amy Nilsson**, Kristinonosgatan 23, VIII, 342 Stockholm, Svedio, dez. interŝ. pm.

* **K-do Harkeviĉ V. P.**, ul. Moskovskaja 45, kv. 4, Lenabad obl., ĈKALOVSK, Tadjika SSR, USSR. Dez. kor. kun ĉinaj gesanoj pri arto, teatro, fotografio kaj aliaj temoj.

* **Maljuna hungara esp-isto** dez. kor. kun aziaj samaĝuloj. Fe-

renczy Imre, GYÖNGYÖS, Sas u. 10, Hungario.

* **K-dino Danuta Slowikowska**, Wloclawek, ul. Jodlawa 3, kaj **k-do Wiktor Kruezkowski**, Wloclawek, ul. Armii Czerwonej 62, Pollando. Dez. kor. kun la tutmondo pri ĉt. kaj interŝ. pk., pm. ktp.

* **Marcu Dorel**, Bucuresti, str. Gutuilor 13, Raionul V. I. Lenin, Rumanio dez. kor. k interŝ. bk. kun Ĉinio, Japanio, Indonezio ktp.

* **BIBLIOTEKO CIRKULANTA S. MIGUEL**, malfermita al la

publiko ĉiutage, dez. starigi esperantan fakon. Estas urĝe petata la kunlaborado de la tutmonda esp-istaro. Elsendu almenaŭ unu libron kaj vi kontribuos por la disvastigado de Esperanto kaj **nepre ricevos memorajon el Brazilo**. Nia adr: R. Cap. Francisco Isaias de Carvalho, 6—S. Miguel Paulista, S. Paulo, Brazilo.

** Kiuj geinstruistoj dez. interŝ. infandeseĝnajojn de 6-16-jaraj gelernantoj? Temoj: pri la vivo de infanoj kaj pri la kutimoj de la regionoj. **Sro Hartmut Werder-**

mann, (21-a) Selmin Westfalen, Auf de Geist 11, Germanio-okc.

* **Deziras ricevi librojn**: "W. Manders: Interlingvistiko kaj Esperantologio; Kalocsay - Waringhien: Plena Gramatiko de Esp; Kitzler: Internacia Gramatiko de Esp.", interŝanĝe mi sendos bildalbumojn de ĉinaj artistoj aŭ fremdlingvajn librojn eldonitajn en Ĉinio. Skribu al **K-do Ho Vero, P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio**. Respondos nur pri tiu ĉi temo.

Finredaktinte

POR speguli la antagonismon de la ĉina popolo dum la lasta tempo kontraŭ la agresa aktivado de la militvendisto Nro 1 Eisenhower vojaĝanta en la Malproksima Oriento kaj nia Tajvan kaj ĝian subtenon al la nefleksebla batalvolo de la aziaj kaj afrikaj popoloj kontraŭ la usona imperiismo kaj ties lakeoj, ni metis en tiu ĉi numero kelkajn artikolojn kaj karikaturojn tiurilatajn. Inter ili la paroloj de Prezidanto Maŭ Zedong ĝuste analizas la situacion de la nuna kontraŭimperiisma batalo de la popoloj en Azio, Afriko kaj Latinameriko, montras la taktikon de la batalo kaj ĝian triumfan estonton, kaj nepre tre multe plifortigos la fidon kaj decidemon de la diverslandaj popoloj en batalo kontraŭ imperiismo kaj por defendo de mondpaco. Liaj vortoj meritas nian ripetatan legadon kaj remaĉon.

Ni, ĉina popolo, ĉiam opinias ke la usonaj imperiistoj havas nenian pravigon por restigi siajn trupojn en la teritorio de aliaj landoj, starigi militbazojn ĉie kaj apogi la de popolo malamegatajn reakciajn pupreĝimojn en diversaj landoj. La lastatempe leviĝinta


kontraŭusona ŝtormo de la aziaj popoloj plene pruvis, ke tio estas ankaŭ ilia komuna sento. La artikolo Forpelu usonan imperiismon el Azio! eldiras la rigoran postulon de la ĉina kaj aziaj popoloj. Kaj la legantoj povos legi el ĝi, kiel profundan malamon kontraŭ la agresantoj vekis ĉe tieaj popoloj la krimoj de la usona imperiismo faritaj en Azio.

Antaŭ la Liberigo, pro la senbrida impostado kaj nenionfaro pri akvomastromado de la Ĉiang-Kajŝek-reĝimo, Ĉinio suferadis oftege naturajn katastrofojn de akvego kaj trosekeco tiagrade, ke preskaŭ same rezultiĝis plago, ĉu el pluvo, ĉu el manko de pluvo. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko grandaj klopodoj en akvomastroma konstruado estas farataj por radikale elimini la naturajn katastrofojn. Depost la alvoko de Prezidanto Maŭ Zedong "Nepre enordigu Huaj-riveron" disvolviĝis gigantaj laboroj por enordigi kaj ĉiuflanke ekspluati ne nur Huaj-riveron, sed ankaŭ la Flavan Riveron, Jangzi-riveron kaj aliajn grandajn kaj malgrandajn riverojn en la

lando. La akvoutiliga konstruado jam fariĝis amasa movado kun tutpopola karaktero, kaj atingis grandajn rezultojn. Dank' al samtempa entreprenado de grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj projektoj kaj ĉiuflanka utiligo de la akvo, riĉa rikolto kun pliigo de totala grena produkto de 10% kompare kun la jaro 1958, estis atingita en la lasta jaro dum kiu okazis tia akvego kaj trosekeco kia ne okazis jam de cent jaroj. Tio estas vere miraklo. La artikolo Nova alttajo de akvoutiliga konstruado prezentas al niaj legantoj la atingojn kaj karakterizaĵojn de niaj akvoutiligaj laboroj. La legantoj legos el tio ke la antaŭensaltego de agrikultura produktado en Ĉinio ne estas hazardo.

Granda disvolviĝo okazis al filmfarado en Ĉinio en la lastaj dek jaroj. Multe leviĝis la nivelo ideologia kaj arta de filmokreado. Kvin orfloroj estas nur unu el multaj elitaj. Tiun filmon niaj legantoj eble havos ŝancon rigardi en kinejo. Ni intencas plu raporti ankoraŭ en estonteco pri la stato de ĉina filmarto.

Multaj legantoj skribis al ni por informi pri la kultura vivo de la nacimalplimulto de Ĉinio. Ilin ni klopodas kontentigi per La kultura disvolviĝo de ĉinaj nacimalplimultoj en tiu ĉi numero.



La Flava Rivero estas jungata ĉe Sanmen-montgorĝo

Foto de Ĉi Guanŝa

